

Marta Prismo



1
1962

Originalist: islanda infano

Ni ŝuldas dankojn sincerajn

al ĉiuj novjaraj bondezirintoj, gratulintoj — kaj donacabontoj, esprimantoj de emociiga amikeco. — Al s-ro G.: Malfruo de manuskriptoj kaŭzas ne malefte neantaŭvideblajoj: ekz. en la nuna n-ro la malĝoja aktual-aĵo de la Emba-artikoloj elpemis sufiĉe multajn paĝojn de jam pretaj artikoloj, i. a. ankaŭ vian. — Ankaŭ al tio apartenas la cetere agrabila novaĵo, ke nia dua n-ro, (aperonta *baldaŭ*) estos

norvega numero

kun *specialaj* artikoloj.

Sume: salutoj al ĉiuj kun reciprokaj amikaj sentoj kaj pardonpeto, se io obstaklas nian bonan intencon.

La redaktoroj.

NORDA PRISMO

*Kultura, socia, literatura
revuo, dwmonata*

Cefredaktoro:

Ferenc Szilágyi, Döbelngatan 66,
BORÅS. (Tel. 244 22.)

Redakcio:

Baldur Ragnarsson, (Reykjavik),
Johan Hammond Rosbach
(Sarpsborg),
Vilho Setälä (Matinkylä),
Poul Thorsen (Kopenhago).

Ansvarig utgivare:

Yngve Nilsson.

Administrado:

Barnhusgatan 8, Stockholm

Abonprezo:

12:— sv. kr. (30 intr. rkp., 2½ us dol. aŭ egalvaloro.) Unuopa n-ro 2:75 sv. kr. (7 int. rk.) Abonu ĉe la administrejo per poŝteka konto 15 54 80 aŭ ĉe la landaj esperantoeledonejoj-libroservoj.

Anoncoj:

1/1 paĝo 80:— sv. kr., 1/2 p. 50:—, 1/4 p. 25:—, 1/8 p. 15:—, 1/6 p. 12:— . Korespondaj anoncoj 4:— sv. kr. (10 int. rkp.)

La redaktejo ne resendas ne akceptitajn manuskriptojn.

ENHAVO

F. Szilágyi: La vagulo haltis	1
T. Nordlöf: La ideologio de la ĝenerala bonfarto	2
EMBA: La bona oĉjo Bion	4
Armand Su: Originala kaj trad. poemoj	5
B. Malmberg (F. Sz.): La vosto	6
A. Tennyson (Foote): La magia insulo ..	8
La poezio de la arkipelago	9
(O. Gardi): La saĝa belulino	13
(Hilda Dresen): Kalevipoeg	14
A. Kasabov (N. Niklav): Enketo	15
J. Baghy: El la notlibro	17
N. Ferlin (F. Sz.): Dezerta floro	18
B. Gahler: De Sudetlando ĝis Islando ..	19
J. Piore: Severa leĝo	21
Radiaktiva emanado	24
M. Gorkij (R. Sikorski): Albatroso	25
E. de Kock: La proza stilo	26
Recenzoj pri: Ombroj de la kvara dimensio; Kredo, floroj, dinamito; La Zamenhofa Esperanto; Bulgara Prozo; Lernolibro de oftalmologio; Nia korpo; Fakto pri Islando; Belarto, Lanti k. c.	28
Novajoj k. c.	16, 24, 25
	3-a kovrilpaĝo

Geografia semajno en Odense

Dum la antaŭkongresa semajno (28/7—4/8 1962) okazos la Kvara Internacia Geografia Semajno en tipe dana popol-alternejo: *Husmandsskolen* apud la urbo Odense.

La prezo estos 175 d. kr. por plena gastigo en dilitaj ĉambroj. Ne-membroj de la Geografia Asocio krompagu 5 d. kr.

Informojn kun aligilo petu — se eble aldonante respondkuponon — ĉe la organizantoj: *Roma kaj Poul Thorsen* — instruistoj por geografio, *Dyblandsvangen 7, Kopenhago, Brb.*

LA VAGULO HALTIS

EMBA! Kun tiu nomo li aperis en la Esp. literaturo. Lia civila nomo estis Emeriko Baranyai. Lia naskiĝjaro: 1902. Emba mortis la lastan nokton de la pasintjara novembro. Korpe li estis malfortulo, melsanulo preskaŭ dum la tuta vivo, cetere proleto kaj senŝanculo kun internaj fortoj kaj riĉo, kiuj batalis dum jardekoj kun lia ftizo. Fine ĝi venkis la korpon kaj la flagran animon.

Iam antaŭ 1930 mi renkontis la unuan fojon Emba en iu senluksa, simpla, dezerte nuda esp. grupejo ie en laborista distrikto de la hungara ĉefurbo. En la ejo svarmis homoj. Esperantistoj firmaj aŭ aktuale sintirintaj al la kulturorganizo, kiun la tiama dekstra reĝimo toleris. Emba, dekomence "laborista" esp-isto apartenis al la unua speco, li havis siajn politikajn principojn, sed al la esp. movado li venis sen flankvojoj kaj sen flankaj pensoj. Li ne havis monon, supozeble malmulte da lernejarajaroj, sed inteligenta li estis kaj en li flamis granda animo. Li troviĝis en ĝangalo, kvankam li volis paroli al homoj. Li havis siajn diraĵojn preta. Jen subite li trovis ŝoseon por si, Esperanton kaj lia problemo estis solvita. En Esperanto li povis valorigi sian formpretecon, sian originalan sukan lingvon, por kies esprimiĝo li estus devinta riski tutvivan penon — supozeble sen ŝanco — se li estus elektinta sian propran lingvon. Liaj korpaj kaj ekonomiaj fortoj estis mizeraj... sed jen Esp proponis sin preta. Emba estis centro de tiu grupo, kie mi renkontis lin. Li estis tiam juna. Larĝvizaĝa, tamen malgrasa vireto li

estis. Laŭ mia memoro li havis relative grandan kapon inter tre mallarĝaj ŝultroj. El la griza vestaĵo mi plej bone memoras la trouzitajn ŝuojn, kiujn li ĉifonigis dum la ĉiutaga kurado por vendi artreproduktaĵojn al la malriĉa publiko. Emba estis ia miksaĵo de ofenziva optimismo kaj melankolia pesimismo: ĉirkaŭ liaj afablaj okuloj estis ridsulkoj, ĉe la buŝo du amaraj sulkoj de la mizero. Iom poste mi ekkonis ankaŭ lian familion: la simpatian, grandokulan edzinon. Ankaŭ ŝi estis malriĉulino certe kun ambicioj. Ili havis etan, same grandokulan, kortuŝe birdide defendindan fileton, kiun la kriza kaj milita mizero rabis de la paro, kies sola konkreta trezoro li estis.

Ĉar la tempoj, la sorto, la mondkrizoj, la milito neniam favoris la poeton, kiu senĉese verkadis, eĉ sen publiko. Li iĝis pli kaj pli kontinue malsana kaj lia vivo iĝis ĉeno de sanatoriaj aŭ hospitalaj restadoj kun mallongaj interrompoj. En 1956 li skribis al mi: "Mi ĵus forlasis la hospitalon kaj fartas bone... nur la spiro atentigas (sur ŝtupoj): Haltu vagulo! Ne ĉiam estas pentekosto!" En la sama letero li priskribas verkotan poemfabelon, (ĉu ĝi realiĝis?) kun la titolo "Du fratoj". Ĝi estus malica fabelo pri diverskarakteraj fratoj, kiuj heredas la ŝlosilon de "Feliĉo" kaj vole-nevole kune migras reen al tiu ĉi paradizo; sed eniri ili ne povas, ĉar la gardantaj drakoj disŝiras ilin.

Kelkaj liaj belaj, individuecaj kaj popolece sukaj poemoj aperis en diversaj revuoj, i. a. ankaŭ en Lit. Mondo kaj Norda Prismo kaj je la

TRA NIA PRISMO

Tryggve Nordlöf

LA IDEOLOGIO DE LA ĜENERALA BONFARTO

La aŭtoro de la ĉi-sube pritraktita libro, red. Ulrich Herz, gvidis antaŭlonge tute novecan kaj stimulan televidan kurson por la publiko kun la titolo: Mondo transformiganta, kun enhavo de pritraktoj de la plej novaj problemoj de la novaj ŝtatoj, novaj klopodoj kaj interrilatoj.

Laŭ la humoristo Birger Vikström, la ordinara homo ne subite aperis en nia epoko. Ĝi ĉiam ekzistis, kvankam la historiistoj raportas nur pri reĝoj, kavaliroj kaj konkubinoj.

Ulrich Herz per sia verko (Väl-färdsideologiens förhistoria från Aristoteles till Marx, Historio pri la ĝenerala bonfarto...) faras escepton. Verkante pri ekonomiaj doktrinoj li rakontas tre ŝpareme pri la aŭtoroj kaj ne falas al la tento de popularaj verkistoj, t. e. al "aŭtentikaj" anek-

dotoj. La interesiĝon li nutras montrante, de kie venas la idearo, kiu inspiras la politikon en nia nuna socio.

Aristoteles ja ne faris verkon pri ekonomio, sed li, kiel ekirpunkto estas ne senmotiva, ĉar en lia verkaro oni trovis ideojn, kiujn la ekonomoj pritraktis dum longa tempo en diversaj epokoj.

Aristoteles distingis inter "produktata" kaj "monakira" ekonomio. Laŭ li riĉiĝi per komerco ne estis tute honeste. Kaj preni renton laŭ li estas uzuro. Kiel povis homo kun tiaj moralprincipoj defendi la sklavecon? Jes: al li la hierarkio kun la sklavoj kiel bazo, estis "natura ordo". Ankaŭ la varoj havis naturan valoron, nefangeblan gradon de utilo, sekvanta la homan hierarkion: "Kiel rilatas verkulturisto al ŝuisto, tiel iliaj produktoj unu al la

iniciato de hungara s-ano S. Fancsali mi kontaktigis antaŭ ĉ. 1 jaro Emban al la Stafeto por eldoni de liaj novaj poemoj. Kiam li kvitancis la scion pri mia ago, li aldonis: "Fakte mi ŝatus jam eldonigi ian volumon. Mi povus kunstarigi ĉe 2—3 el la es-tantaj versoj, kiuj estas almenaŭ tiom bonaj kiel tiuj en "En Ekzilo" aperintaj."

En la sama letero troviĝis poemo, kiu povus esti finvinjeto lia. Antaŭ tio mi volas nur menciigi, ke Emba verkis ankaŭ malgrandan kolekton da hungaraj tradukoj "La Profeto", kaj la interesan, sed ne plene impresan romanon: "Maria kaj la Grupo". Lia ĉefa talento montriĝis en la poezio, per kies analizo ni ŝuldas al la Esp.

literaturhistorio: Lia suba poemo povus esti adiaŭo:

SIPO

*Fiere naĝas jen la ŝipo,
kiun mi konstruis ŝvite.
Dum ĝi pretiĝis, mia ripo
kurbiĝadis elĉerpite.
Ĝi jaroj miaj estas en la
hune ĝin tenanta fero
kaj riŝgadas per ĝi jen la
boroj lastaj for de l' tero.
La ŝipo se nun malaperos,
iĝos glataj akvorondoj,
kaj morta muto alkonkeros
lokon de la intaj ondoj.*

Estus malbone, se la imago de la poeto verigus lin. Liaj verkoj meritis pli daŭran ondadon.

LA BONA OĈJO BION

Ni kantu jam pri Bion, oĉjo bona,
 ĝoje, ke lia speco ne elmortas.
 Li, libraĉeta kaj gazetabona,
 eĉ versojn legas kaj la stelon portas.
 Li estas dupieda propagando,
 ĉiu evento verda — por li frando,
 kiun li ĝuas elpuŝante krion:
 "Ho, se la kara Majstro vidus tion."

La lingvo ne malsanas anemie:
 Vortaro Plena, Plena Gramatiko
 aspektas jam pli ol akademie
 kun la timeble respektinda diko.
 Kaj AT A-IT A-skriboj, Terminaroj!
 Se oni pesus, estus du kvintaloj.
 Ekkerias nia bona oĉjo Bion:
 "Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Dankeble al la dezirata lakto
 La vangoj de l' Movado dike glatas:
 grasiĝo de UEA estas fakto,
 ankaŭ la digna SAT jam ne malsatas.
 Ĉar estas multaj SAT-geedzigitoj,
 grandnombre kreskas jam la
 satanidoj.

Ekkerias nia bona oĉjo Bion:
 "Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Ne nur la plenaĝuloj ĉiujare,
 sed ankaŭ la infanoj kongresetas,
 pri io-ujo-stato scias klare
 kaj tukon, vazon Esperante petas,
 eĉ, kiujn multaj trovas neallogaj,
 plezuraj pri la vortoj neologaj.
 Ekkerias nia bona oĉjo Bion:
 "Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Sed pli ol tiu ĉi florad' kaj kresko
 ja gravas en la Esperanta vivo
 tiu decida venko en Unesko,
 kiun elluktis nia brava Ivo.

Dum Blinkenberg sin kaŝis en
 la kelon,
 eĉ Oriento streĉis la orelon.
 Ekkeris nia bona oĉjo Bion:
 "Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Ne vane la kantistoj jam esperas,
 ke l' Muza kis' ne restos nur sekreta:
 Regulo Pérez plej regule peras
 verslibrojn al popolo' plej aĉetpreta.
 Ho, eble post ioma paso tempa
 eldonos li poemojn eĉ de Emba.
 Ekkerios tiam bona oĉjo Bion:
 "Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Ni ne forgesu pri legaĵo spica,
 kiun prezentas ĉiam ĉe Papero
 la Norda Prismo, Suda Stelo, Nica,
 kaj eĉ se mankas al ni ekzemplero,
 ni scias pri l' ekzisto de l' revuoj,
 kaj jam eĉ tio banas nin en ĝuoj,
 ke krias nia bona oĉjo Bion:
 "Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Kelklande iam estis granda fasto,
 kaj pluraj, laŭ la modo oblikvante,
 prenante Esperanton por balasto,
 formanĝis siajn librojn tutakvante.
 Jen manĝo fasta, ne tre bonkvalita,
 eĉ se kun margarino surŝmirita.
 Horore kriis bona oĉjo Bion:
 "Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Jen estis la epoko de malfondo:
 la forvelkiĝ' de l' arbo asocia,
 la morto de Literatura Mondo,
 "ne taŭgas lingvo krom nacinacia".
 Sed malgraŭ kvako de la veter-ranoj,
 eltenis spite kelkaj veteranoj
 kaj inter ili bona oĉjo Bion.
 "Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Ĉi-tempe eĉ Balkányi ne laboris,
la artikoloj restis en burĝono,
kaj Kalocsay triste nur langvoris,
eĉ Floroj estis al li de Malbono.
Feliĉe Waringhien ĉiulunde
mal-malojn al li sendis plu abunde.
Ne diris, tamen, bona oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Kaj fastis Baghy en la nesto doma,
sin kutimigis al ĉi striktaj limoj,
kaj, dum cerbumoj pri la Homo
Homa
li ŝajnis esti unu el Viktimoj,
sed diris tamen: "Emba, hej, vi vidus,
Konsilantaron foje mi prezidos.
Mi sub Pomarbo antaŭsonĝis tion."
Ho, kion dirus nun la bona Bion!

Mi fastis kun Maria (en la Grupo)
eĉ ludis patron-panjon En Ekzilo,
kaj dum boladis nia fabo-supo
ni revis jam pri nia nova filo.
Por domi al ni la necesan hardon,
Bartelmes sendis la Junecan Ardor.
Juneca ardo, ĉu ni havas tion
almenaŭ tiom, kiel oĉjo Bion?

La granda fasto pasis for postlonge
danke' al Unesko, Bokarev-klopodoj,
samideanoj ĉesis dormi ronke,
venis gazetoj, libroj (eĉ kun odoj).
Kaj are, kiel en rivero flosoj,
aperis ankaŭ ĉiam novaj glosoj.
Ekkriis nia bona oĉjo Bion:
"Ho, se mi povus lerni ĉion tion."

Li tamen lernas, pigre ne bradipas,
li estas ne maljuna, eĉ se olda,
instruas, organizas, varbas, skribas,
eterne esperporta, ĝojherolda,
en la farado sen memfarado,
model' de samidea kamarado.
Ni povas diri mem pri oĉjo Bion:
"Ho, se la kara Majstro vidus tion."

Armand Su

Senmaska dramo

ARMAND SU estas ĉina esperantisto.
Li esperantistiĝis en 1956, 19 jara. En
1957 li komencis verki poemojn esperante
kaj traduki el diversaj lingvoj esperanten.
Li scias pli ol 20 lingvojn.

Finiĝis la komedieca amludo
inter mi kaj mia knabin'.
Ni disiĝis amike en mutoj,
kaj ni ne plu rekonas nin.
Ekde nun mi devas ludi nevole
en la malnova senmaska dramo.
kiel solul' ludi senparole,
sen amatin' kaj sen amo.

Mon Hao-ĵan (Ĉino, 689—740)

Printempa aŭroro

Mi dormis printempe, pri aŭroro'
senkonscia.
La birdkantoj estis aŭdeblaj ĉe
pord' ĉia.
Dumnokte pluvis kaj vent' blovis,
Kiom da floroj defalis, neniu scii
povis.

(El la libro "300 poemoj el la
Tan-Dinastio")
el la ĉina trad. Armand Su

Furuda Oĝiro (Japanujo, 1899-1925)

Komenco de l' aŭtuno

Je krepuske', en aŭtun' ventblova,
Min turmentas ree la sopir' nova
L' aŭtun' venas. De l' vespera vent'
karan voĉon aŭskultas mi en silent'.
Susur' sur pinbranĉoj en vent' vespera
mi sentas doloron de l' aŭtun' sufera.
Tradukis: Armand Su

LA VOSTO

I.

Sekureco en la ekzisto, tio estas sekreto de la infanaĝo, al kiu ni tiel sopire rerigardas, kiam ni songas pri la perdita paradizo.

Por plenkreskulo apenaŭ ekzistas sekureco — maksimume pri okaza narkoto de la sento pri malsekureco, eble obstina spito, kiu ne *volas* vidi, ne *volas* scii, "sur kia kaduka humo ni konstruas la domon de niaj tagoj."

Sed la infano ne vidas, la infano ne scias, ĝi ne vidas kaj ne scias, ke ĝi vivas en ŝanceliĝanta mondo. Kiel facile ĝi dancas sur ĉiuj siaj vojoj. Tial ĝi ne povas senti, ke ĝiaj piedoj kuras super lulantaj tufoj.

Demandu la infanon, kio estas fajro, kaj ĝi respondos: "Estas la lignardaĵo kaj la lampo." Eble ĝi respondos: "La suno kaj la luno." Aŭ: "Io kio fajteras." Aŭ: "Io kio brilas." Sed ĝi neniam diros: "Ĝi estas io, kio cindrigas kaj pereigas, dezertigas terpecojn kaj konsumas la koron kaj la malsanan sangon de malfrusomeraĵ febroj."

Demandu infanon, kio estas frosto, kaj ĝi respondos: "Io kio mordas la haŭton tiel, ke oni ricevas ruĝajn vangojn." Aŭ: "Io, kio glatigas la vojon de glitveturilo kaj glitiloj." Sed ĉu tio estas ankaŭ io alia? Ĉu ĝi ne mortigas ankaŭ la koron kaj ĝian feliĉon? Ĉu ĝi ne estas ankaŭ glaciiga trablovo dum la malheliĝantaj jaroj? Ĉu ĝi ne estas io, kio malfekundigas la vivon — nehelpeble, senindulge? Demandu la infanon pri tio kaj ĝi respondos: "Kiel nehelpeble do? Kiel senindulge, do?"

II.

Tamen okazas kelkfoje, ke ondo el la maro de la malsekureco ruliĝas en la longfundan golfon, kie la infano ludas per siaj velboatoj.

Ĉke (elp. Oke) estis infano. Li sentis savon kaj ŝirmon ĉe la hejmanoj. Li ja timis kelkajn aferojn, hundojn sur la strato k. s. Sed li ne havis timon pri sia vivo. La vivo kaj li estis bonaj amikoj.

Nun estis vespero kelkajn tagojn post Kristnasko. Ĉke sidis en la granda salono en Väja (elp. Veja) kaj ludis per eta skatolo kun vitrokovrilo. Kaj en la skatolo kuŝis etaj, tre etaj gnomoj. Kiam oni frotis la vitron per ŝamsaketo, kiu estis plenŝtopita per io, ekleviĝis la etaj etaj gnomoj kaj eksaltis. Ĉke jam ricevis ege multe da kristdonacoj, sed li havis tamen pli da plezuro pro la malnova skatolo, kiu jam delonge troviĝis en Väja, ĉe kiam lia patro estis malgranda, kaj pro la etaj, etaj gnomoj. Sed nur, ĉar ili povis salti.

Tra la malfermita pordo oni povis vidi en la laborĉambron. Tie sidis la patra avino en apogseĝo kun la mano malantaŭ la orelo kaj aŭskultis onklino Göta, (elp. Joeta) kiu laŭtlegis ion al ŝi. Tie sidis ankaŭ la patro kaj patrino de Ĉke, kaj tie sidis Aja kaj gravigis sin: ĉar ŝi kudris.

Kaj ĉiuj sidis sub pala ringo de la lamplumo.

Ĉio estis laŭ sia ordo, kaj estis neeble senti sin pli sekura ol Ĉke sentis.

Avino estis avino, onklino Göta estis onklino Göta, paĉjo kaj panjo estis paĉjo kaj panjo, kaj Aja estis Aja, kia ŝi tiam estis. Kaj Ĉke estis Ĉke.

Kaj la etaj gnomoj estis la etaj gnomoj, kaj io alia neniam povis fariĝi el ili.

Eĉ momenton ne transkuris la menson de Āke, ke io povas ŝanĝiĝi, ke io fremda kaj terura povus rompi vojon en tiun ĉi hejmon kaj en lian propran vivon.

Tiel sekura sentis sin Āke, sidante tie kaj frotanta la vitron per la ŝamsaketo, dum la etaj, etaj gnomoj saltadis kaj turniĝis kaj estis ĝajaj en sia eta mondo.

III.

Kaj sidante tiel, hazarde li aŭdis jen kaj jen el tio, kion onklino Göta laŭtelegis por avino.

Longtempe li aŭskultis nur unu-orele; sed subite li ekaŭskultis per ambaŭ oreloj.

Ĉar onklino Göta legis pri io tro stranga.

Temis pri malgranda negra knabo. Āke ĉiam kredis, ke la negroj estas tre feliĉaj, ĉar ili havas bukajn harojn. Sed tiu ĉi eta negro ne estis feliĉa, sed male, ĉar li fariĝis simio.

Unue vosto kreskis sur la eta negro, kaj tio pretendis kompreneble tempon. Kaj poste li ricevis harojn tutkorpe. Sed kiam li iĝis vera simio, neniu volis koni lin plu, eĉ ne lia patrino. Kaj oni prenis ŝtonojn kaj pelis lin arbaren. Tie li devis grimpi sur la arbojn.

Sed dum la vesperoj, kiam iĝis mallume, li revenis al la negrovilaĝo kaj sidiĝis kaj ploregis ekster la kabano de sia patrino. Kaj li kriegis ege terure, ĝis oni forpelis lin.

Āke opiniis, ke estas kortremige pensi pri la kompatinda eta negro, kiu estis tiel senhelpa. Kaj li ne povis daŭrigi plu la ludon.

Tial li levigis kaj eniris al la aliaj.

Sed nun okazis io, pri kio Āke neniam povis pensi.

Kiel Aja ekhavis tian ideon, estas malfacile diri. Ŝi saltis de la seĝo kontraŭ Āke.

— Staru trankvile, Āke, ke mi povu palpi vin, diris Aja.

Post tio ŝi ekfingrumis tute sub la dorso de Āke kaj subite ŝi kriis:

— Hura, hura, Āke havas voston! Āke fariĝas simio!

Āke liberigis sin de Aja kaj poste diris:

— Vi estas stulta.

Li bone komprenis, ke Aja incitetis kaj li ĵetis koleran rigardon al ŝi.

Sed kiel ajn, ne, ke li estus kredinta, kion Aja diris, sed ĉiuokaze — Kiel ajn, li metis sian manon malantaŭ la dorson kaj komencis palpi, kie Aja estis palpinta.

Kaj nun —

Ĉu li kriis? Ne, tion li ne faris. Li staris tute silenta. Sed li kredis, ke lia koro estas haltonta. Ĉar li sentis ion. Ne multe, sed tamen ion. Tio estis — ne — jes, tio estis, tio ne povis esti io alia, *tio estis komenco de vosto.*

Nenia dubo ekzistis plu. Āke estis survoje por iĝi simio.

Li ne manĝis multe tiuvespere, preskaŭ neniom. La ploro ŝtopis la kolon. Tamen li prisilentis sian malkovron. Eble li timis, ke oni tuj forpelus lin, se li malkaŝus tion.

Ankaŭ Aja diris neniom. Ĉu ŝi jam forgesis pri la tuta afero?

Vespere li iris tien-reen en la ĉambroj plena de maltrankvilo. Kelkfoje li stariĝis ĉe iu fenestro kaj platigis la nazon kontraŭ la vitron. Sed tuj li ektimiĝis pro la vintra nokto ekstere kaj pro ĝiaj fantomaj neĝombroj, pro la steloj super branĉaroj kaj pro ĉio terura, inter kiuj li trude devus erarvoji sen ŝirmo kaj sekuro, se li estos simiiĝinta.

Jes, tien oni pelos lin. Neniam plu li rajtos enveni kaj sidi inter la hejmanoj. Li kvazaŭ vidis, kiel li kuŝas

ekstere en la neĝamaso kaj kriegas, eta krispa pakajo kun longa vosto.

Āke, Āke, kio iĝis el via granda sekureco?

IV.

Nun li kuŝas en sia lito kaj nature, li devus dormi.

Liaj patro kaj patrino jam dormas kaj ankaŭ Aja suĉadas kaj dormadas.

Ĉed li mem eĉ ombron de dormo ne ricevas.

Kvazaŭ la tuta mondo estus kolapsinta kaj enfosinta lin sub la ruinojn. Flugema vorto ĵus atingis lin kaj konjektigis al li la tutan malsekurecon kaj danĝerplenon de la vivo.

Subite li ekploras. Li ploras unue mallaŭte por ne ĝeni la aliajn. Sed la ploro volas sufoki lin kaj fine li devas plori nehaltigeble.

Tiam vekigas lia patrino, kaj Āke rajtas grimpi al ŝi en la lito.

Tie li rakontas, kio premas lin, kiel senlime angora li estas, kaj ke li ne volas iri en la frostan vintronokton.

Ĉirkaŭ ili estas silente, oni aŭdas la spiradon de la dormantoj, kaj la pala lumo de la kandellumo falas al patrino kaj infano.

— Dolĉa panjo, diras Āke. Rigardu, ĉu mi havas voston?

Kaj li leviĝas. Li staras meze de la lito, kaj per ambaŭ manoj li levas la ĉemizon super sian etan postaĵon.

— Ne, respondas la patrino. Vi ne havas eĉ signon de vosto. Estu tute trankvila.

Kaj ŝi aldonas:

— Tio estis stulta historia, kion onklino Göta legis. Ĉar eĉ se povas okazi, ke iu iĝas kvazaŭ besto kaj tiel terura, ke neniu volas toleri lin en sia proksimo, tiel tamen ne faras lia panjo kaj ne forpelas lin, pri tio vi povas esti tute certa, Āke. Pri tio vi povas esti tute certa.

Kion nun faras Āke?

A. Tennyson (1809—1892)

LA MAGIA INSULO

*Qi tie ŝvebas dolĉmuzik' kvieta
Pli ol sur herb' bloviĝas rozpetaloj
Aŭ noktoser', sur akvo senmoveta
Inter silikombrataj brilaj valoj.
Muzik' al la spirito tiel paca
Kiel palpebro sur okulo laca,
Muzik' loganta dormon el ĉiel'
dormeca.*

*Jen musk' profunda,
Kaj tra la musk' beder' abunda,
Kaj laŭ la riveret' florar' longonda,
Kaj de la roka bret' papavo dorme
penda.*

El la angla: A. Foote

Plej volonte li kurus sur la planko, ekdancus kaj ridus kaj krius:

— Mi ne havas voston. Nenian voston mi havas! Mi havas nenian voston!

Sed li scias, ke tion li ne rajtas fari. Kaj subite li volas ion alian. Li volas ŝovi sin denove en la liton kaj ĉirkaŭbraki la patrinon. Kaj tion li faras.

Kaj tie nun li kuŝas, kaj lia mondo estas denove tuta kaj sen fendeto, tiel rapide ia tio povas okazi. Kaj li etridas por si mem.

Sed subite li diras:

— Panjo!

— Jes, fileto mia.

— Se mi tamen ekhavas voston?

— Vi neniam havos voston, respondas la patrino.

— Ne, diras Āke. Tion mi scias. Sed se mi ricevus . . . ?

— Jes, kio do okazus tiam?

— Ĉu mi povus ŝvingi ĝin? diras Āke.

El la sveda: F. Szilágyi

LA POEZIO DE LA ARKIPELAGO



Roland Svensson estas sveda grafikisto kaj pentristo. Li naskiĝis en 1910 kaj nuntempe li apartenas al la unua linio de la eksterordinare alt-nivelaj svedaj libroilustrantoj. Krom tio li estas ankaŭ pentristo kaj liaj verkoj troviĝas en la sveda Nacia Muzeo kaj aliaj publikaj kolektoj. La arto de Roland Svensson kunkreskis kun la poezio de la maro, insuloj kaj homoj, kiuj vivas tie, multe pli proksime al la natureco ol la "kontinentuloj". Roland Svensson, kiu estas stokholmano, rapide povas atingi tiun ĉi mondon. La stockholma arkipelago kun insuletoj, rifoj, arboj, alta ĉielo kaj profundaj koloroj, ĉarmaj linioj, nove kaj nove impresas ankaŭ nin, kiomfoje ni vidas ĝin. Ne nur tia artisto, kiel R. Svensson, sed kiu ajn eknostalgias al tiu mondo, kies re-

ganto estas la kaprica vento, kiu kreas ondojn kaj novajn — liniojn. Li renkontis dum sia kariero verkiston, Sven Barthel, kies entuziasmo direktis lin same al la vivo de la maro kaj arkipelago kaj la du poetoj de la maro kune kreis plurajn belajn librojn. Elinter tiuj ni elektas kelkajn ilustraĵojn de la grafika artisto kaj jen ni citas kelkajn liniojn el la libro "Arkipelago". (Aperis en 1952.)

"Tio estas la arkipelago de Stokholmo, kiun mi amas, plena de memoroj kaj plena de ebloj por novaj memoroj. Ĝin mi volas traveli ĉiusomere kaj eĉ tiom mi ne atingos. Ĉiusomere mi volas viziti ĉiujn konatajn insulojn, insuletojn kaj homojn. Mi neniam povas atingi ĉion jam konatan kaj malkovri ĉion novan. Kiam mia mano ne plu fortos teni remilon,




estos ankoraŭ insuloj en la arkipelago, de mi neniam viditaj, neniam surpaŝitaj.

Tiel riĉa estas la arkipelago de Stokholmo, tiel riĉe neelĉerpebla; ĝi sufiĉas por tuta vivo de viro.”

La arkipelaga naturo estas plezure riĉa kaj la animo de la artisto per sia propra riĉo kapablas sekvi, rekrei la insularan mondon, (kiun S. Barthel elokvente prezentas vorte).

Estas kompreneble, ke R. Svensson ne ilustris nur tiujn — oni povas diri — siajn librojn, sed multajn aliajn, kaj antaŭ iom da tempo la sveda televido prezentis intervjuon kun la artisto, prezentante sur la bildsurfaco amason da belaj, okulplezurigaj bildoj, kies kreanto montris sin granda (en la pli granda formato de telebil-





doj) tiurilate, ke ĉiu linio aŭ detalo glate, harmonie, sinklarige, inspirite, plenkonscie kun la signo de granda artisto unuiĝis kun la harmonio de la tuta kreaĵo.

Roland Svensson tre karakterize diras pri la ilustra arto en la verko "25 nutida svenska tecknare" (25 nuntempaj svedaj desegnistoj):

"La desegnaĵo, kiu estas konstruita



sur linia kaj valor-senso ĉe la artisto, demaskas lin senidulge. De ilustristo oni postulas krom la kapablo desegni ankaŭ la interesigon pri la literaturo kun kompreno kaj konsidero de tio, kion la aŭtoro celis per sia verko. La ilustranto devas havi senson por la ritmo de la rakonto, kapablon por konstati, kie ĝia kulmino estas. Laŭ mia opinio li ne klopodu ilustrati la kulminon mem, sed klopodu por kreo de sugestiva kadro por la skribita vorto. — Por la eblo kunlaboro kun tipografaj ekspertoj kaj kliŝfabrikantoj la artisto devas posedi iom da scio pri la tekniko ĉirilate.”

La verkoj de Roland Svensson “demaskas” ne nur perfektan teknikon kaj metian, sed ankaŭ internan komprenon, parencecon, admiron de la naturo, kies ritmon li enspiras kaj transformas je poeziaj vidoj.

Fine mi volas esprimi nian profundan dankon al la artisto, kiu ne nur permesis la aperigon de siaj artaĵoj, sed je nia peto volonte helpis nin en la elekto el lia riĉego abunda kolekto por aperigi, t. e. kliŝigi ilin por Norda Prismo kies spacomanko obstaklas prezenton de pliaj, egale ravaj bildoj de la arkipelaga naturo.

LA SAĜA BELULINO

(Afgana popola fabeleto)

Unufoje iris laŭ sia vojo la bela virino.

Malantaŭe iris iu viro, kaj longtempe senĉese sekvis ŝin.

Tiam la belulino sin turnis kaj demandis lin:

”Kial, por kio vi persekutas min, malkonatulo!”

”Mi ekamis vin, plej bela el la belulinoj!”

La virino ridetis kaj parolis: ”Malantaŭ mi iras mia fratino. Ŝiaj okuloj estas nigraj kiel nokta ĉielo. Ŝi estas multe pli bela ol mi, dekoble.”

Li viro ekĝojis kaj ekkuris reen.

Li kuris, kuradis kaj vidis: malrapide, lame iracas laŭ vojo maljuna, maljunega tre malbela virino.

Li eĉ kraĉis ĉagrene kaj kolere kurigis returne piedsigne, por kuratingi la junan belulinon.

Li fine atingis ŝin kaj ofendite diris:

”Kial vi mensogis, pro kio vi trompis min?”


”Ne, vi eraras. Vi trompis min, malkonatulo.

Se vi amus min, vi neniam ekkurus al alia virino!” La viro ekhontis, konfuze sinturnis kaj foriris laŭ sia vojo.

Notis kaj esperantigis *Oskar Gardi*

PRAARBARAJ GRANDPAPILIOJ

estas sendotaj al institutoj kaj privatuloj interesataj en la tuta mondo. Moderaj prezoj, korektaj servoj. José ANDERS, Kolonio SUDETIA, Corr. Carlos Pfannl via Villarrica, Paragvajo, Sudameriko.



KALEVIPOEG

I.

El la dua kanto de la estona nacia eposo "Kalevipoeg" (Kalevido — Filo de Kalev).

(Linda priploras la morton de sia edzo Kalev. El la larmoj fariĝis lago "Ŭlemiste" apud Tallinn, el kiu la urbo ricevas sian trinkakvon.)

*"Veoplenas viv' vidvina,
suferigas la soleco,
sen apogo mi similas
nun al muroj sen tegmento,
aŭ al kampo vent-vipata,
de mayondoj minacata,
la vidvino sola vivas,
sola kun la sort' batalas!
Falas foliar' de alnoj,
jam en vent' paduso veas,
la pomuj' petalojn perdas,
staras en ventblow' betuloj,
la tremolo froste tremas,
kverkoj sen kovraĵo estas,
ankaŭ la aceroj nudas,
sen strobiloj la piceoj,
sen beraroj sorpoarboj, —
mia sort' senŝanĝa restos,
plenos vivo je veado.
je torturo kaj turmento,
larmabundo kaj lamento!"*

II.

El la 3-a kanto. Kalevipoeg (Kalevido), iras al la tombo de la patro por eksciĝi kie estas la forrabita patrino. La tombo de Kalev estas la alta urboparto de Tallinn.

*La plej kara Kalevido
sur la patran tombon paŝas,
al altaĵo sin apogas
por konsoli koron sian.*

Patra voĉ' el tombo vokas.

*"Kiu sur la sablo staras,
sur la tombo peze paŝas,
sablo sur la frunton falas,
gruzo sur okulojn gutas."*

Li ekaŭdas, ame diras:

*"La plej juna fil' fidela,
li nun sur la sablo staras,
sur la tombo peze paŝas,
sidas en sufer' sincera
sur la patra tombo paca.
Ho, leviĝu, patro kara!
Ho, vekigi, paĉjo mia!
Vi konsilu, kie trovi
la perditan panjon karan!"*

*Patro jene ekparolas,
de sub ter' tremvoĉe diras,
el la tombo tiel vokas:*

*"Nek leviĝi, nek vekigi
povas mi, fileto juna.
Rokon oni sur min rulis,
peza ŝtono korpon premas,
kovras brovojn floroj flavaj,
bluaj brilas sur okuloj,
sangeruĝaj sur la vangoj.
Ventoj al vi vojon montru,
vin aero ame gvidu,
steloj saĝon liveradu!"*

El la estona: *Hilda Drescu*

Reeldono de Zamenhof-verkoj

Editions Françaises d' Esperanto (Marmande) intencas reaperigi la plej gravajn verkojn de dro Zamenhof: la 5-lingvan Fundamenton, Lingvajn respondojn, Hamleton, Marta ktp.

La entrepreno eldonis belan portretkarton de Zamenhof, kiun oni povas mendie pere de ni: 10 ekzempleroj por sv. kr. 3:20 aŭ 8 resp. kup., 20 ekz. por 5:40 sv. kr aŭ 14 resp. kup.

ENKETO

La enketo en la fakoficejo jam estis ĉe sia fino. Ĝis la 11-a horo oni pridemandis ĉiujn krom unu — t. e. librotenisto Kojnakov.

Li sidis apud sia skribotablo kaj faris bilancon.

Sed vere dirite li nenion faris. Li nur komencis la bilancfaradon, erare kalkuladis la unuajn ciferojn, ĉifis furioze la paperfolion kaj ĵetis ĝin en la paperkorbon. Sur la skribotablo estis disĵetitaj deko da plumoj, difektitaj pro nervostreĉa uzado. Lia kraĵono, pintigita por unua fojo ĉimatene, restis ankoraŭ nefinuzita. Ĉe malfermo de la pordo li ekstremadis simile al persono kiun trakuras elektro. Li ne povis kviete sidi sur la seĝo kaj nerve tiris la nodon de sia kravato. Tiu ĉi streĉa atendado tiel multe konsumis lin, ke lia flaviĝinta vizaĝo, havanta kavetojn pro variolo, akiris mizeran doloran mienon, simile al persono suferanta pro galdoloro.

"Kial oni ne vokas min? — li cerbumis. Oni pridemandis ĉiujn, kaj pri mi oni eĉ ne konjektas! Aŭ ili min ne demandas..."

Ĉe tiu ĉi sia penso li ankoraŭ pli kurbigis, kvazaŭ li fandiĝis en sia nigra kostumo. Li kvazaŭ transformiĝis je muso, kiu deziras kaŝi sin kaj malaperi de la homaj rigardoj.

"Ili ne pridemandos min! — pensas li maleme." Ili scias, ke mi estas protektata de Nikolov kaj li min oficigis tie ĉi.

La plumo malice ekgrincis sur la paperfolio. Ankoraŭ unu paperfolio eniris la paperkorbon.

"Ili scias, ke mi estas favorato!"

La librotenisto konsternite ekrigardis

dis ĉirkaŭ si — ŝajnis al li, ke li prononis la vorton "favorato".

Sed evidente tio ne estis okazinta. Liaj kolegoj laboris same kiel ĝis nun.

Kruela sorto!

Esti favorito de ĉefo, kiun oni ekzigos!

Vidadi en ĉies rigardo rideton kaj ironion!

"Sed eble ne ĉio estas perdita? Oni povas eksigi Ljoĉev, kaj ne Nikolov!"

La librotenisto Kojnakov ŝtele ekrigardis al Ljoĉev. Li rakontadis ion gajan al tajpistino. De lia arogante kuraĝa vizaĝo, de liaj etaj okuloj, de lia tuta figuro elradiadis tia memcer-teco, ke la librotenisto tuj komprenis, ke liaj iluzioj estas vanaj.

"Kia fiulo! — pensis li furioze. — Kia fripono! Li certe jam prizorgis sin. Li jam trikis sian fiŝreton tiel kiel estas konvene al li!"

Sed pro kio estis necese al Nikolov ataki lin? Kial li mem brakumis erinacon? Malkapablulo li estis! Sen povo diligente kaj sukcese labori! Estis tiel klare! ... Pli facile estas al oni eksigi la kapablan personon, ĉar li nur pri siaj kapabloj esperas. Kaj la malkapablulo ĉiam havas iun post sia dorso — aŭ en la centra oficejo, aŭ en la ministrejo!"

Kaj ankaŭ kun Ljoĉev tiel okazis. Nikolov donis petskribon pri lia eksigo, kaj la amiko de Ljoĉev en la ministrejo provokis enketon kontraŭ li. Motivoj (tiom facile estas elpensi ilin) — manko de organiza talento, li ne povas gvidi, sed diktatoras, ne povas akorde labori kun la oficistoj.

Vere la ĉefo estis bona al mi, sed plej poste ... estas necesa ankaŭ iom

da koleגיעo! Oni devas aŭskulti la voĉon de la amaso! Se la oficekolektivito havas kontraŭan opinion, ankaŭ mi . . . pro kio estas necese, ke mi iru kontraŭ ĉiuj? . . .”

Subite ŝavpenso limigis la libroteĥniston kaj li pro ĝojo ne sukcesis fini la pensadon.

Precize tiam la pordo malfermiĝis kaj la pedelo Marin ŝovis sian kapon tra ĝi.

— Kamarado Kojnakov!

— Mi — eksaltis kiel risorto la libroteĥnisto.

— Oni vokas vin "tien"!

Oni vokas lin!

Kaj lin oni vokas!

Kojnakov stariĝis duonkonsternita. Oni fidis al li. Oni donas al li eblecon . . .

— Mi venas, mi venas — balbutis li kaj per tremantaj manoj kolektadis siajn dosierojn, kvankam, tio ne estis necesa. Ankaŭ same nenecese li poste malbutonumis kaj butonumis sian jakon, translokigis sian naztukon de la dekstra al la maldekstra poŝo kaj post plenigo de siaj pulmoj per aero ekiris "tien".

Ĉirkaŭ la 16-a horo la enketistoj finis sian laboron, la komuna decido estis formita, la sorto de Nikolov decidita — li restis ĉefo, kaj Ljoĉev perdis sian postenon.

— Ĉiuj en la oficefako defendis vin Nikolov — premis lian manon la direktoro. Nur tiu, vi scias, via favorato — Kojnakov, klaĉis kontraŭ vi.

— Tio ne povas esti! — protestis Nikolov.

— Pro kio mi mensogu al vi! Demandu ankaŭ la ĉefon, respondecan pri la oficistaro.

Nikolov demandis lin . . .

Kaj keljkajn semajnojn pli poste, ĉe renkonto sur la strato, li kraĉis al sia favorito . . .

Unesko eldonis vidhulpilojn por instruo pri Azio kaj Eŭropo

Kiel parto de sia laboro stimuli la instruon de internacia interkompreno, Unesko eldonis serion de diagramoj, kiuj enhavas fotojn, mapojn kaj bazan informon pri ok eŭropaj landoj: Belgujo, Britujo, Danlando, Francujo, Okc. Germanujo, Hispanujo, Jugoslavio kaj Sovet-Unio.

La serio estis planita simile al kolekto pri ok aziaj landoj, kiun Unesko kaj la Nacia Instruista Sindikato de Britujo kune eldonis en 1959. La azia serio, kiu temis pri Cejlono, Filipinoj, Hindujo, Indonezio, Japanujo, Kamboĝio, Pakistano kaj Tajlando, fariĝis tre populara en lernejoj. Oni do decidis reeldoni ĝin.

Ĉiu aro de diagramoj kunhavas porinstruistan broŝuron, kiu donas fonan informon kun speciala emfazo pri la ĉiutaga vivo de la popolo. La teksto estas verkita de kompetentaj geografoj kaj edukistoj de la koncernaj landoj. La Internacia Geografia Unio kunlaboris. La lingvoj de la broŝuroj estas nur franca kaj angla, sed oni preparas pliajn broŝurojn kaj nun ilustrajoj por tiuj, kiuj volas presigi aliajn lingvojn en ilin.

(Laŭ Unesco-Features kaj UEA-informservo)

Mila fojo

La 28-an de decembro 1961 la Varsovia Radio donis sian milan disaŭdigon en Esp. Kiom da kultura valoro signifas tiu ĉi institucio, scias ĉiu, kiu atentis la programojn tagon post tago el Varsovio. Ni varme gratulas la entuziasman aron redaktantan la disaŭdigojn kaj ripetas la jenan frazon el la revuo "Polytika": Ŝajnas, ke Esperanto entute bone ekzameniĝas kiel rimedo de vasta interkompreniĝado de homoj de diversa nacieco, interŝanĝo de informoj kaj konceptoj, kaj per tio servas al la afero de proksimiĝo, kunlaboro, kultura ligiteco."

Ni sendas nian varman dankon perlitere pro la voĉoj tiom simpatiaj el la etero.

La 14-a Internacia Fervojistista Esp.-kongreso

okazos en Budapeŝto 5—11, 5. 1962 kun riĉa programo, t. e. labora same kiel ekskursiva. Petu informojn: 14-a IFFJ-Kongreso, *Budapest 64*. Poŝtfako 7.

Eble kiel ĉefo li ne devus tiel agi, sed li diris, ke li faris tion nur kiel homo.

El la bulgara: *Nik Nikolov* (Sofia)

El la notlibro de sepdekjarulo

La socia vivo estas ekstera konkretaĵo, kreata de interna, abstrakta vivo de homaj komunoj. Variajn spegulbildojn pri tio oni povas trovi en la diversaj kulturoj. Ĉi spegulbildoj laŭepoke alternas, la karakterizaj trajtoj ŝajnigas eĉ ŝanĝon, sed esence ili ne montras *internan* progreson. Jen la tragedio de l' Homo!

La vivon de la Homaro karakterizas, ke ĝi konsistas el kreado kaj kultura servado de ĥimeroj, hodiaŭ sanktaj kaj morgaŭ jam ridindaj.

Ĉu la pesimismo estas klarvido pri vaneco? Ĉu la optimismo servas kiel vualo por ne vidi la vanon de bataloj? Ĉu ili ambaŭ estas malsanaj statoj de la "vivprincipo" renversanta la ekvilibron inter la ĝenerala naturreĝo kaj superforta ambicio de la Homo? Mi ne scias, sed . . . mi jam spertis, ke ekzistas *kreopova* pesimismo kaj *detruanta* optimismo. Mi povus nomi ilin metafore — tajdo de la homa menso: defluo kaj alfluo de pensoj. Sen tiu tajdo la homa vivo ne multe diferencus de la vivo vegetaĵa.

Kompreni la Vivon estas neeble. Estus prefere ĝui senpripense la *ekziston*, sed . . . sed la Homo ĉiam cerbumas, klopodas trovi la "kialon", ĝin difini per — vortoj. (Ve, ne per senvortaj — sentoj!) Miloĵ da vortoj, miloj da difinoj kaj por ĉiu nova generacio konstruite staras — *vivlabirinto*, en kiu mankas la — gvidfade . . . Ĉu la detruo de tiu ĉi labirinto

— se tio estus ebla — alportus la sopiratan feliĉon? Versajne, ke ne, ĉar la *nura ekzisto* senoaze dezertiĝus kaj al la Homo mankus eĉ la mizera amuzo — e r a r v a g a d i.

La "gvidprincipo" ofte estas nur — kolŝnuro, per kiu oni blinde ligas sin al iu — manĝotrogo, supozeble bonŝance elektita en la granda stalo socia. Oni ofte miselektas . . . baldaŭ la furaĝo seniluziigas, la subpajlaĵo pruviĝas neŝanĝeble sterkmakulo, tamen ŝiri la ŝnuron oni ne plu havas — kuraĝon.

La fideleco ofte estas nur rezigno pri eblo ŝanĝi la *kutimon*, kiu estas la plej abomeninda sklavismo, ĉar ĝi konsumas en ni la homan dignon kaj igas nin kompromise cedi eĉ al tio, kio rezultos nian pecon.

La diplomatio similas al tiu kuracisto, kiu atentis sole pri la korpo, nur ĝin ŝtopas per medikamentoj, sed obstine neas, ke necese estus havi ankaŭ psiĥan ekvilibron por la plena resaniĝo.

La inspiro neniam trompas; nur la poetoj trompas per — inspiro.

DEZERTA FLORO

*Nun ŝi jam atendis streĉe.
Ŝi esploris,
poste premis mian manon:
"Vidu, tamen ĝi ekfloris."*

*Estis ŝia aĝa kaktio,
mi apenaŭ kredis vero,
dum la plej malluma tempo
ĝi ekpompis kun fiero.*

*Nun ĝi floras — antaŭ morto.
Sed ni ja nenion timis.
Panjo iom gorĝmalsanis
kiel vintre ŝi kutimis.*

*Kaj ŝi diris en la lit':
"Mi fartas bone. Preskaŭ sane.
Mi ja sciiis, ke ĝi floras.
Vi ne kredis tion. Vane."*

*Jes — respondis mi: "Ja strange,
fine tamen nun vi pravas.
Mi ne sciiis, ke la kaktio
tiam brilan floron havas."*

*Ni ĝin havis tiom longe,
sen imago ke ĝi floras
iam, ie en la mond' kaj
jen ĉi tie ĝi odoras.*

*Kaj fratinoj miaj venis,
haltis, mire ekkrietis
ili diris: "Ke ĉi kaktio floras,
ni neniam kredis."*

*Brilis klare kaj silente
antaŭ mort'. Tiel okazis,
ke dezerta floro donis lumon
en la hejmo,
kiam panjo nin forlasis.*

El la sveda: F. Szilágyi

Aktorino estas kiel luksa aŭtomobilo: ŝi estas bela, multekosta, ĉiam kuregas sur kurbaj vojoj kaj finas ofte — pro kolizio ĉe apudvoja arbo.

La Homo naskiĝas bona, nur poste li lernas la metion de la malico.

Ve al tiu, en kiu vegetas amaro pro pasinteco, ĉar li neniam kapablas vere ĝui la estantecon.

La socialista realismo estas tiu, parte imagita io, kion intelekto kaj sentimento per sociformanta kreoforto

povos konkretigi. La vojo de la konkretigo: 1) per ĉiu rimedo de artoj kaj sciencoj eduke krei novan homotipon; 2) Tiu ĉi homotipo, havanta mondpercepton kaj moralon, diferencajn de la nuntempaj, estigocirkonstancojn, kiuj hodiaŭ povas ŝajni utopiaj, almenaŭ ne realaj, sed jam hodiaŭ ili kune antaŭenĵetas la bildon de la realeco estonteca; 3) do la nun sopirata realeco en la proksima epoko evidentiĝos kiel fakta realeco, fizika kaj psiĥa, socia kaj scienca, arta kaj politika kaj tiam ... 4) kiel la legenda serpento mordos sian finon kaj la socialista realismo fariĝos la — nova naturalismo.

DE SUDETLANDO ĜIS ISLANDO

(Oskar Just



Portreto de Oskar Just

La akademia pentristo naskiĝis en 1895 en Kukan apud Gablonz-Neisse, mondfama bijuteria urbo en la nordbohema Sudetlando, kiel filo de vitropremisto, profesio tipa de tiu ĉi regiono. Jam en la lernejaj jaroj montriĝis ĉe li amo al la naturo kaj desegnado. Sed nur en pli altaj klasoj de gimnazio oni ekatentis lian talenton eksterordinaran. Sekvas jaroj de figur-pentrado en la ŝtata artmetia lernejo de la gepatra urbo, poste li evoluigas sian pli kaj pli individuiĝintan talenton en la Viena altlernejo de praktika arto. Samtempe li studas anatomion, aktdesegnadon kaj krome arkitekturon.

Lia talento tute ne elĉerpiĝis en la pentroarto; li kunlaboris ankaŭ en kreado de urbaj librejoj en la sudetgermanaj regionoj. La publiko ekatentis la pentraĵojn de Just kaj ekspozicioj varbis por li en la kadro de Metznerbund, ligo de ĉiuspecaj artis-

toj el la sudergermana kulturvivo, nomita laŭ la skulptisto Franz Metzner, kreinto i. a. de la grandiozaj figuroj en la Leipziga Popolbatala monumento. Just emis pentri pejzaĝojn, portretojn de ludantaj infanoj.

Li fine decidas sin tute dediĉi al la pentrado kaj forlasas la aliajn profesiajn branĉojn, entreprenas vojaĝojn al Germanujo kaj al la skandinaviaj landoj. Inter 1927—30 li portretas en Stokholmo, multajn konatajn svedojn kaj en la stokholma arkipelago pli ol 20 gvidantojn kaj knabojn de la Stokholma skolta societo, kies honoran insignon oni dediĉis al li. En 1936 en la olimpia vilaĝo li portre-




O. Just: Asgeyr Asgeyrsson, islanda ŝtatestro

tas la elstarajn tipojn de la internacia sportularo el 24 nacioj.

La milito interrompas la artistan agadon . . . kaj la militfino trovas lin en franca militkaptiteco. Fine libera — li iĝas viktimo de la giganta trudpopolmigrado kaj devas serĉi anstataŭ la malnova en la sudeta regiono novan hejmon kaj novan komencon. Sed propraĵo povis perdiĝi; la energio, fervoro kaj talento serĉis elirvojon.

En alpa regiono de Hinterstoder en Supra Aŭstrujo, li trovas novan hejmon. Peniko, farbo, tolo aŭ papero ree fariĝis haveblaj kaj li ree komencis en sia fako. Baldaŭ en la fora regiono oni parolas pri li, kiu bildigas la tipojn de la montarkampara regiono. Sed nevenkebla sopiro estas en la animo al la nordo kaj nun li vojaĝas al la fora Islando, kies solēca kaj kruda majeste bela kaj alloga naturo

vokas lin. Ne longe daŭras kaj ankaŭ tie oni atentis la soleculon, kiu penetras ĉie infanojn islandajn, kiu desegnas florojn kaj muskojn ĝis la plej delikataj detaloj, kiu haltigas fiŝistojn kaj paŝtistojn por eternigi iliajn trajtojn, sed ankaŭ la ŝtatestro de la norda insulo ne hezitas sidi dum horoj por doni al la longvojaĝinta artisto la eblecon bildigi lin. La tipa sopiro al la pradevena nordo kaptis lin kaj li dediĉas sin preskaŭ plene al ĝi. Dum vintro Oskar Just restadas en sia bela aŭstruja novhejmo, sed kiam alvenas la sturnoj, li febre ekpakas la valizon kaj la ilaron pentristan kaj flugas al la norda Islando, kiu magie kaj nerezisteble vokas lin. Tie kreante, li rememoras la malnovan kaj novan hejmojn sur la kontinento, sed la amo de lia koro apartenas al Islando, al la prae mistera, sovage bela, grandioza insulo de la plej antikva homa kulturo.



Oskar Just: Islanda pejzaĝo

SEVERA LEĜO

Julia Pióro estas ne-juna pola sinjorino, kies noveloj aperadis en la E-gazetaro.

Vivis iam Virino kiu ne povis morti. Vane Morto rondiris ĉirkaŭ barilo antaŭ la domo, kie ŝi loĝis! Pro la fajfanta spiro de Morto sekigis kaj falis ĉiuj folioj en la ĝardeno, sed la Virino vivis kaj ĝuis bonan sanon. "Neeble, neeble, diris al si Morto, mi fariĝas pli kaj pli malgrasa, mi fariĝos eĉ tia kiel fadeno, gardestarante ĉiam apud tiu obstina estaĵo! Se malsanoj ne povas ŝin venki, mi petos por helpo Akcidenton."

Venis Akcidento, alvokis Tempes-ton, skuis grandan, maljunan arbon en ĝardeno, forŝirante ĝin kun radikoj el la tero, kaj forĵetis la tegmenton. Poste ĝi turnis sin dancante sur la sojlo kaj elflugis sur la tempestaj nuboj.

"Kapo plena da vento kaj petoloj" plendis Morto rigardante post li — "Nenia helpo de tiu mondvagisto!" Kaj en granda turmento li iris fine al Severa Leĝo.

— Severa Leĝo! — diris kliniĝante antaŭ maljuna, barba homo kun vizaĝo severa kaj saĝa — Mi, kompatinda Morto, metas mian povon kaj oficon ĉe viaj piedoj, ĉar mi ne povas pli longe estadi en senutila servo. Deprenu de mi tiun ŝarĝon! —

— Vi min tre mirigis, Morto — diris Severa Leĝo. — Kvankam videble vi malgrasigis, tamen tio ne povas esti kaŭzo de ekzigito. Mi supozas ke vi kaŝas malkontenton pro ia malsukceso. —

— Jes, ho Ĉiovida! Vivas sur la

tero ia Virino, kiu kuraĝas kontraŭstari Vian Leĝon! Ŝi vivas tro longe. Maldece, malobeeme kaj senorde! —

Severa Leĝo enpensigis.

— Kion faras via Virino kutime?

— Ŝi plejparte sidas en ĝardeno kaj faras ian virinan laboreton per alenetoj. Ĉe ŝiaj piedoj kuŝas la korabeto kun volvaĵoj de lano. Mi ofte senpacience provis peli ŝin, sed ŝi obstine sidas ĝis la unuaj steloj ekbrilas sur la ĉielo.

— Ne pelu ŝin! Ŝi sidu! La vesperoj estas malvarmaj...

Vane atendis Morto almenaŭ kataron... La Virino eĉ ne ekternis, malgraŭ malvarmaj vesperoj. La malpacienca Morto alarmis tamen Servon de Sano, sed devis longe atendi ĝis alvenis la kuracisto. Li esploris la pulson kaj tre rapide skribis iom da medikamentoj.

"Mirinde! — diris li al si — Ŝi havis neniam eĉ kapdoloron. Tiel longan vivon ŝi ŝuldas eble dank' al malregula funkciado de sekreciaj glandoj. Mirinde! Mi devas anonci tiun okazintaĵon en gazeto kuracista."

— Bonan nokton, sinjorino! Mi devas rapidi. Jen estas por vi kelkaj medikamentoj. Li eliris, kaj samtempe la vento kiu enpenetris la ĉambron pro malfermita pordo, forportis la recepton por eterne. Nokte, ŝtelirante sub la fenestroj kaptis ĝin la Morto.

"Nur sensignifaĵoj! — murmuretis legante — Senefikaj... Iam estis alie. Kuracistoj preskribadis medikamentojn, kiuj ofte donis fulman rezulton. Tiam estas la tempo! Nun ili nur rapidiĝas... — diris li kolere al ne-

videbla kuracisto. — Ĝis kiam mi haltigos vian automobilon!”

Kaj senespera li iris denove al Severa Leĝo.

— Nenia helpo de nuntempaj kuracistoj, Severa Leĝo! Ili malbone skribas receptojn . . . kaj nur rapidas. Kaj la Virino ĉiam vivas, vivas, vivas . . .

Severa Leĝo enpenŝiĝis profunde.

— Oni devas esplori.

— Ho, Severa Leĝo! Mi priesploris ĉiujn ĉambrojn de ŝia domo, la vestaĵon, eĉ ĉiujn kameretojn de ŝia korpo! — Sed Severa Leĝo rigardis lin malestime.

— Vi?! Vi estas vulgarulo, bona por timigi la popolon, irante tra vilaĝo kun falĉilo sur la osta ŝultro! Al tiu persono oni devas esti delikata kaj ruza. Mi pripensos kaj sciigos vin.

La Morto ofendita eliris trenante peze siajn piedojn. Post iom da tempo Severa Leĝo sendis al Virino raportiston de fama gazeto. Li tuj alvenis kunportante grandan fotografan aparaton. Antaŭ ĉio li fotografis la domon, ĝardenon, korton de ĉiuj flankoj. Poste li ekstaris antaŭ la Virino, sidanta en la ĝardeno kun sia laboreto en la manoj kun la nedisigebla korbeto ĉe la piedoj.

— Madame! — li kliniĝis elegante — Mi estas reprezentanto de la gazetaro. Famo de via beleco kaj eterna juneco estas tiel granda, ke ĉiuj virinoj en nia urbo ne povas ekdormi pro akraj atakoj de la ĵaluzo. Mi petegas vin, en la nomo de niaj legantoj, precipe legantinoj, diru ion pri via vivo, aŭ ion pri la rimedoj por konservi vian belecon!

La virino levis al li siajn klarajn okulojn.

— Kion diri? Ĉio estas tiel simpla! Mi ne konservas mian belecon. Kaj pri la sekreto de juneco mi povas do-

ni nur jenan konsilon: enrigardu neniun kurban spegulon, nur tian kiu rekte reflektas! Mi estas en amikeco kun la mondo — ŝi aldonis post paŭzo — Amas min bestoj kaj birdoj, kaj mi amas la vivon, kiu ŝatas esti larĝa kaj libera. Jen estas ĉio!

La raportisto aŭskultis atente.

— Sed iam via vivo estis alia: vi havis edzon, infanojn, nepojn. Ĉu ne tedas vin la soleco, ĉu ne enuigas vin ĉiutage, la unutona maniero de la vivo?

— Mi transvivis miajn proksimulojn, ĉiujn cagrenojn kaj dolorojn, kaj nun por la toksino de unutoneco mi havas kontraŭoksinon.

La oreloj de ĵurnalisto pintiĝis.

— Kaj tiu kontraŭtoksino estas . . .?

La Virino montris responde sian laboron. La raportisto faris neglektan geston.

— Pri tio fidus nenia virino en la mondo! Vi ne estas sincera!

— Sed estas tiel, fidu al mi Eble la kaŭzo kuŝas en tio ke mi ne timas la Morton? Ĉiuj timas kaj alkroĉiĝas al diversaj objektoj por ne pensi pri la Morto. Ili trovas feliĉon en multaj idoloj, sed kiom da idoloj, tiom da timoj. Riĉulo adoras siajn riĉaĵojn kaj timas la perdon, malriĉulo faras sian altaron por la idolo de la sama riĉeco. Kaj ili ambaŭ estas egalaj kiel du ĝemeloj antaŭ timo. Vi ekzemple havas vian feliĉon en publika opinio kaj vi timas por ne ofendi ĝin kaj ne kontraŭstari al ĝi.

— Madame! — adiaŭis la ĵurnalisto — Konversacii kun vi estis tre interese. Mi revenos baldaŭ.

Li iris elreviĝita. La Morto, sin kaŝita ĉe angulo de la domo, ekaŭskultis ĉion, frotis la manojn pro kontento. "Ne nur mi malvenkis", murmuris kaj baldaŭ raportis tion al Severa Leĝo.

— Nenia helpo de ĵurnalisto! La Virino estas ruza kiel vulpo kaj malmola kiel ŝtono. Si laŭte anoncis ke ŝi ne timas min!

Severa Leĝo enpenŝiĝis profunde.

— Morto, — diris fine — vi laciĝis vere, tial mi donas al vi senlimtempan forpermeson. Mi mem iros al tiu Virino!

La okuloj de la Morto ekbrilis.

— Iru, iru! Ŝi estas bongusta peceto por vi. Mi neniam vidis tiel blankan kolon kaj tiel ruĝan buŝon!

La suno jam malaltiĝis al subiro, kiam Severa Leĝo haltis antaŭ la pordego de ĝardeno. Silento balanciĝis en la aero, lulante birdojn al dormo. Videble ili ekkonis sian Sinjoron, ĉar iliaj lulkantoj fariĝis pli kaj pli silentaj kaj fine ili eksilentis tute. Severa Leĝo laŭte ekfrapis la pordegon:

— Mi venis al vi, Virino, por momenta konversacio. Dediĉu al mi iom da tempo!

— Volente, Sinjoro — kliniĝis profunde Virino.

Sidiĝu sur tiu benko sub jasmeno kaj mi baldaŭ alportos kruĉon da pomvino.

Sed ordonanta gesto de Sinjoro haltigis ŝin.

— Sidiĝu apud mi! Mi havas malmulte da tempo. Mi venis al vi, ĉar mi jam delonge aŭdis ke vi kontraŭstaras al Severa Leĝo kaj ne volas morti. Diru, kial vi, kiu ne estas senmorta, kuraĝas haltigi normalan kuron de aferoj homaj? Vi, mortema estaĵo, kuraĝas spiti al justa Leĝo, kiu ordonas morti? Diru, kial vi faras tion? La Virino subite ekstaris. Ŝiaj okuloj brilis.

— Sed mi neniam vidis Morton! Sinjoro akuzas min maljuste. Eĉ je unu momento mi ne vidis lin. Morto — tio estas por mi afero nekonata!

— Oni diras ke vi primokas la

Morton — malmole diris Severa Leĝo — Tio estas granda peko, ĉar vi ne estas pli ol aliaj homoj. Pro kia rajto vi povas kontraŭstari?

— Pro kia rajto? — La Virino prenis defenzivan pozicion. Pro la rajto de la vivo! Jes, mi ne timas Morton kaj versimile tio estas kaŭzo ke mi lin ne vidis! Mi amas la vivon kaj neniu havas rajton apliki stagonon al ĝia ĉiam freŝa akvo kaj stariĝi digojn!

— Silentu, senhonta Virino! — la voĉo de Severa Leĝo sonegis kiel tondro — Tio estas malkaŝa ribelo kontraŭ via kreinto! Sed mi indikos al vi vian lokon kaj limon!

Li leviĝis grandega, minaca, kaj komencis per grandaj paŝoj iri laŭ la ĝardena vojeto. Dume li falĉis per sia bastono ruĝajn kapojn de rozoj, kiuj abunde floris je ambaŭ flankoj de la vojeto.

”Rozoj en decembro? — li murmuris kolere — ĉitie ne estas tropiko! Morto evidente blindiĝis, se eĉ ne vidis tion. — kaj la bastono faris sian rikolton.

La Virino iris post li kun premita koro.

— Aŭskultu min, Sinjoro!

Mi neniam kaŭzis doloron al iu ajn estaĵo!

Mi ĉiam amis pacon!

Mi ĉiam kontraŭstaris al militoj!

Mi preĝis ĉe ĉiuj altaroj por paco kaj malapero de krueleco inter homfratoj!

Sed la paŝoj de la fortika Sinjoro estis pli kaj pli rapidaj. Sterniĝis kiel postsigno sangruĝa randstrio. La Virino jam preskaŭ kuris apud li.

— Sinjoro, aŭskultu min!

Mi kantis lulkantojn ĉe ĉiuj luliloj de la mondo!

Mi vartis ĉiujn infanojn en miaj brakoj!

Pro tio la mondo pardonis al mi miajn pekojn.

Kial do vi estas pli severa ol la mondo?!

Sed la Severa Leĝo ne aŭdis. Li rapide proksimiĝis al laŭbo, kie sur malgranda benko staris korbeto kun volvaĵoj de lano. Tamen la Virino estis pli rapida. Ŝi enkuris laŭbon kaj kovris la korbeton per siaj brakoj.

— Mi malpermesas ĝin tuŝi! Ŝi kriis laŭte — Tio estas mia sankta rajto! Mi alvokos helpon de la tuta ĉielo, kiu falos sur vian kapon!

La Sinjoro eliris sian ostplenan manon kaj forŝiris la korbeton el la virinaj brakoj. La ŝpinaĵo falis teren kaj malkovris internon de korbeto: kuŝis en ĝi eta infano, tre bela kaj ĉarma. La Virino kaptis ĝin kaj premis ĝin al sia brusto.

— Jen estas mia mistero, ho Sinjoro! Vidu burĝonon de la Vivo, kiun mi ŝirmas!

La infano ridis kaj etendis siajn manetojn al Severa Leĝo. Kaj jen okazis io stranga! La Sinjoro ekridetis. Radiaj strioj de rideto inundis la severan vizaĝon, kiu fariĝis simila al la vizaĝo de sentema patrino.

— Restu en paco, Virino! — diris la Sinjoro.

Vi estas nevenkebla!



Korekto

Bv. afable korekti la poemon "Ludo" (P. 136, 1961.) post la kvara verso jene: ... puŝ'. — Peterson svene aspektas. — Esi ke, desi ke, for la glor'. — Esi ke, desi ke ... ktp. Pardonon!

Radiaktiva emanado kaj leŭkemio

Docento en la radiologio, d-ro Arne Nelson verkis artikolon por la gazeto "Byggnadsarbetaren, 1/1962" (Trad. konstrulaboristo), pri la supra temo. Ni citas el la konkluda parto de la artikolo:

Laŭ amerika statistiko leŭkemio aperas 5-oble pli ofte ĉe radiologoj kaj 1,75-oble pli ofte ĉe kuracistoj ol ĉe la ĝenerala publiko... Oni devas akcenti, ke efiko de leŭkemi-frekvenco aperis speciale ĉe altaj radiadodozoj, kiam la tuta korpo aŭ ĝiaj ampleksaj surfacoj asis atingita de la radioj... Niaj scioj pri efiko de malfortaj radiadozoj estas ankoraŭ mankhavaj, sed por esti certa oni konkludas, ke troviĝas t. n. linia rilato inter la radiadkvanto kaj ĝia efiko. Oni povas supozi, ke por la estigo de la efiko necesas certa limkvanto.

Laŭ tio oni ne povas forigi la konjekton, ke radiadpliĝo kaŭzas difektigojn, dependajn de la emanado.

Tiu situacio postulas, ke oni agu singarde kun penso pri eventuala subtakso de la riskoj. Samtempe oni ne povas lasi ekster atento, ke nuntempe ni konjektas iom troigitan danĝeron ĉe emanado pri malaltaj radiadnivelejoj.

(Rimarko: la artikolo okupas ĉefe sin pri pri la paca uzo de la atomenergio.)

La Internacia Oficiala Specimenfoiro de Barcelona daŭre uzas Esperanton

Por la jaro 1962 jam estas preta la oficiala afiŝo pri tiu gravega foiro. (Jam por la tria fojo en la Internacia Lingvo.)

Temas pri moderna gajkolora reklamilo en la formatoj 70x100 cm., kaj 30x40 cm., kiuj taŭgas, ne nur reklami pri la foiro, sed atesti pri la disvastiĝo de Esp.

Ni petas al la tiumonda Esperantistaro veran diluvon da leteroj por peti afiŝojn SEN-PAGE al: 30a Oficiala kaj Internacia Specimenfoiro Propaganda Fako, Paseo de Maria Cristina, s/n Barcelona 4 - Hispanujo.

Se able skribu sur papero de komerca, turisma aŭ industria entrepreno kaj menciu la lokon kie la afiŝo estos montrata.

Ne preterlasu okazon kontraŭ jarabono de "Norda Prismo" akiri la "Cinano Antologio".
— Propaonas el SovetunioLitovio, *Kaunas* 6, Vebeliunas Albinas.

Kanto pri la albatroso

Super griza marprofundo vento nubojn kolektadas. Inter nuboj kaj la maro brave ŝvebas albatroso al la nigra fulm' simila. Jen ĝi ondon tuŝas ale, jen al nuboj flugas sage, krias li — kaj nuboj aŭdas ĝojon en la kri' kuraĝa. En la krio — ŝtormavido. Fortkoleron, flampasion kaj certecon pri la venko aŭdas nuboj en la krio. Mevoj ĝemas antaŭ ŝtormo — ĝemas, tremas super maro kaj sur fundo ĝia pretas kaŝi timon pro la ŝtormo. Kaj kolimboj ankaŭ ĝemas, ja kolimboj ne kapablas ĝui en batal' de l' vivo: ili timas tondrobatojn. Kaj pingveno stulta time sub rok' kaŝas korpon grasan. Nur fiera albatroso ŝvebas brave kaj libere super maro grizeŝaŭma, Malserenaj nuboj daŭras malleviĝi super maro, kaj ondegoj kantas, dancas al altaĵ', al tondr' renkonten. Tondro frapas. Saŭmkolere ĝemas ondoj, kverelante kun la vento. Jen ĝi kaptas ondegaron firmatene kaj jetadas vastasvinge en sovaĝ-koler' al rokoj, disbatante ŝprucpolvare la smeraldajn akvomasiojn. L' albatros' kun krio ŝvebas, al la nigra fulm' simila, sage ĝi trapikas nubojn, ondan ŝaŭmon ale tranĉas. Jen ĝi flugas demonece — brava, nigra ŝtormdemo — kaj ĝi ridas kaj ploregas... Ĝi pri nuboj ridas brave, ĝi pro ĝojo ploras ege. En koler' de l' tondro fulma ĝi delonge lacon aŭdas; ja ĝi scias, ke ne kaŝos nuboj sunon, ne, ne kaŝos... Vento hurlas... Tondro frapas... Bluaflamaj nubaj aroj flagras super marabismo. Maro kaptas fulmajn sagojn kaj en sia en' estingas. Kiel nigra serpentaro en mar' vibras

malapere la rebriloj de l' fulmaro. — Stormo. Baldaŭ frapos ŝtormo. Sed aŭdaca albatroso brave ŝvebas inter fulmoj super muĝ' de l' mar' kolera: krias li — profet' de l' venko: La pli forta frapu ŝtormo!"

Tradukis R. Sikorski

La traduko estas dediĉita al

1. Lisiĉnik (Kutaisi)

Gazetnovaĵoj

1. *Nova civito* (Dumonata Esp. revuo, ĉefred. Igino Giordani, redakcio Via Della Serofa, 14, Citta Nuova, Romo. Abonprezo 2 \$.

La modernaspektan revuon karakterizas la jena deklaro: Nova Civito "volus esti renkontopunkto — unu el la multaj — por tiuj, kiuj sentas sin kristanoj, kaj ĉe la vortoj de la Papo "tragedia neceso" ne ŝanceliĝas, ne atendas, sed ekagas por atesti Kriston en unueco inter si kaj kun la paŝtistoj starigitaj de Kristo." Lerta redakto, varia enhavo.

2. *Tamen*, gazeto de pola Esp. junularo. Parte nacilingva, sed plejparte E-lingva organo kun enhavo rilatanta la junularop. Aperas 10-foje jare, multobligita, abonprezo \$ 1,50. Eldonloko: Str. Mickiewiczza 2/4 Torun, Pollando. Ne nur bultena karaktero, sed varia cetera enhavo, literatura, k. s. kaptas la interesiĝon de la legantoj.

3. *La Gazeto* (9 bis, Rue du Commandant -de Poli, Orléans (Loire) Franc. Monata, franclingva, hektografita, kies redaktoro Pierre Delaire estas inventema, ideoriĉa spirito, pri kio atestas la "Gazeto".

Estonaj ĝelernantoj (15 j.) Lea Veelma, Miloi Lük k. Peuno Reesaar (knabo) deziras koresp. kun ĉ. l. pri ĉ. r. P. J. L. Tallinn, 14-a Lernejo, Tatari 1. Estona SSR.

LA PROZA STILO EN ESPERANTO

Ĉi tiu demando estas tre larĝa, koncernanta efektive ĉiujn aspektojn de la lingvo, sed mi provos pritrakti ĝin el nur unu vidpunkto, nome tiu de la efiko kiun havas la belsoneco. Eĉ ĉi tion mi nur skizos, ne dezirante verki libregon pri la afero ĝuste nun!

Por diskuti tion inteligente — aŭ almenaŭ kompreneble — necesas unue difineti la terminojn *Esperanto* kaj *prozo*. Eble iuj legantoj koleriĝos, opiniante, ke mi volas malŝpari ilian valoran tempon per sensprita ŝerco. Kial necesas difino pri aferoj tiel bone konataj, ke eĉ iu ajn eterna komencanto komprenas ilin senpripense? Tamen, ili bonvolu indulgi mian fantazion, ke ne estas tiel simple.

Ĉiu scias, ke Esperanto estas la kromnomo de internacia lingvo, kunmetita de D-ro Zamenhof, kaj aperinta en la jaro 1887. Sed... en kio ĝi efektive konsistas? Unue, ĝi *ne* estas la Fundamentaj gramatikreguloj kaj *ne* la oficiala vortaro. Tio reprezentas nur kvazaŭ la signifobrikojn kaj la prikonstruan gvidlibron. Eĉ — Esperanto enhavas en la praktiko — kiu sole gravas por lingvo — multe pli ol dekseks regulojn kaj la vortaro ne konsistas el nur oficialigitaj radikoj, sed tio estas flanka afero, kvankam tre interesa per si. Kio tamen bezonas akcentadon, tio estas, ke Esperanto ne egalas siajn disde konsideratajn elementojn, sed ĉiam ekzistas *nur* en tiu aŭ alia konkreta formo: en la parolo, en poezio kaj en prozo. La ceteraĵo estas nur la teorio.

Leksikologoj kaj bonaj gramatikistoj en la nacilingvoj nuntempe komprenas, ke vortaroj kaj reguloj estas esence aposterioraĵoj — kvankam ne

nur tiaj — venantaj post kaj ne antaŭ la lingvo. Pro la historia ĉirkaŭteksto, la esperantistoj, tamen, opinias, ke ĉe Esperanto la afero estus tute alia, efektive inversigo, laŭ kiu la lingvo devenas el kaj, por tiel diri, sekvas la gramatikon kaj vortelementojn. Sed ĉu vere? Malgraŭ la ŝajno, mi opinias, ke ne. Zamenhof ne publikigis projekton sed jam funkciantan lingvon. Ekzistas pruvoj, ke antaŭe li multe verkis kaj ĝin elprovis, adaptante, por harmoniigi ĉion, la gramatikon kaj aliajn elementojn, kiujn li poste formulis skemece, por doni ian skeletan ideon de la lingvo mem. En tio konsistas la unikeco de Esperanto inter la aliaj "interkomprenigiloj", ke ĝi aperis kiel organika lingvo, io, kies tutaĵo estis multe pli ol la sumo de partoj, kiel en la naturaj lingvoj. Male projekto kiel Interlingua tute ne estas lingvo, sed nur abstrakta kolekto de elementoj. Ĉi tio estas komparebla al senorda aro da brikoj, dum Esperanto sin manifestas ĉiam kiel plenkonstruitan domon por iu homa pensaro aŭ emocikomplekso.

Kompreni tion helpas al ni difini la terminon *prozo*, ĉar se Esperanto — por ekzisti en la praktiko — ĉiam postulas iun konkretan lingvan manifestacion, estas logike, ke ni havu nomojn por la diversaj, malsame funkciantaj manifestacioj. Persone mi konceptas ilin en tri kadroj: babilado, prozo kaj poezio. Ĉi-lastan mi ne konsideros ĉi tie, krom oblikvaj mencioj, sed la unuaj du bezonas komparon.

Babilado, ĉu parola, ĉu skriba, konsistas en neversa (kaj ja malpoezia!) lingvo- uzo karakterizita de iu

senzorgeco pri aŭ ne sufiĉa atento al estetikaj postuloj. Ĝi estas kvazaŭ hazarda kunĵetaĵo de lingvaj elementoj, ofte laŭ la naŭva kaj falsa supozo, ke bona Esperanto povas rezulti de tia misprocedo, aŭ — en la parolo — la sekvo de tio, ke ĉiu konversacio ne povas esti artverko! Multaj babilantoj mortos babilantoj, sed iuj el ili povus verki prozon per la eltrovo, ke stilo, kaj, sur pli serioza nivelo, la lingvo mem, konsistas esence en iu aranĝo de elementoj, precipe ankaŭ laŭsone.

Prozo sin manifestas parole (kiel ĉe bona oratoro aŭ parolanto) kaj skribe. Ĝi diferencas de babilado en tio, ke ĝi estas neniel hazarda kunĵetaĵo de lingvo-elementoj sed rezultas el zorga de ili aranĝo, kvazaŭ ĉe poezia verkado. En tiu aranĝo tre grave rolas la sona aspekto menciita en la unua paragrafo.

Jam kelkfoje en nia literaturo oni asertis, ke Zamenhof konceptis Esperanton kiel poetan verkon. Domaĝe, ke la samo ne veras pri ĉiuj niaj verkistoj, kies prozo precize pro tio iafoste havas barbaran, pro senzorgeco malbelan aspekton! Eĉ malgraŭ la danĝero iom elvojiĝi for de mia temo — kvankam ne malproksimen — mi volas doni ekzemplon de la Zamenhofa sentemo pri la belsoneco, kiun oni probable alcelas per la aludita aserto. Temas pri la elekto por nia lingvo de tiu vorteto *kaj*. Kial, efektive, li decidis enkonduki ĝin en Esperanton?

Laŭ la propra klarigo, li preferis ĝin al *e* kaj *et* (ja pli internaciaj formoj), por eviti signifokonfuzon kun la adverba finaĵo kaj la diminutiva afikso. Tio, tamen, estas nur la negativa aspekto. Ni povas demandi, kial li tiukaze ne uzis anstataŭe la anglan *and* aŭ la germanan *und*, ambaŭ certe

pli internaciaj ol la grekdevena *kaj*. La respondo troviĝas en la interesege maniero laŭ kiu li konceptis la sonstrukturon de la lingvo, kiu cetere ankaŭ koincidas kun ĝia logika konsisto. Ĉiu komparinta Esperanton kun Occidental rimarkis kiel uniformefekte fluas nia lingvo kaj, pro la komparo, kiel balbutece efikas tiu kurioza, estetike nekunmuldita miksaĵo de lingvoj. La kialo troviĝas en ĝis nun ne sufiĉe rimarkita sonsistemo, kiu daŭre pulsigas la frazojn.

Ni ekzameni la jenan frazeton: *Ĉiu bona esploristo komprenas la valoron de persistaj klopodoj*. La plej frapa fakto estas, ke la plejmulto de vortoj finiĝas vokale. Eĉ la plurala *j* estas duonvokalo, kaj *n* ne estas sufiĉe peza por serioze malhelpi la facilan transfluan de la parolo de vorto al vorto. Eĉ la verbfinaĵa *s* facile ligiĝas kun sekvantaj sonoj. Krome menciendas la ofte aŭtomata variigo de vokaloj, tiel ke ne tro ofte ili ripetiĝas en la sama loko. Ekzemple, la substantivo havas la o-finaĵon sed ne la adjektivo, kiel okazas nacilingve. Tio ne estas hazarda rezulto de la gramatika sistemo, sed efektive kaŭzis, ke la gramatiko alprenu tian formon.

Nun ni scias, kial Zamenhof ne deziris *and* aŭ *und*, kiuj tute ne taŭgus por nia lingvospeco. Li volis havi vorteton finiĝantan vokale kaj preferi konsonanto ĉe la komenco, por eviti vokalkolizion kun la finaĵo de antaŭe uzita vorto. El la lingvoj al li konataj li prenis la grekan *kaj*!

Por reveni al la ĉeftemo de la proza stilo en Esperanto, ni devas do noti, ke ĉi tiu nobla lingva instrumento — kies karakteriza naturo mem estas tiom bazita sur sonkomplekso — postulas de ĝia prozo zorgan aranĝon de elementoj, ĉar precize pro ĝia ĉufonia delikateco ĝi tuj kaj fortege

LIBRO-KULTURO

KVARA DIMENSIO

Edwin de Kock: *Ombroj de la kvara dimensio*. Poemaro originala kun Antaŭparolo de Marjorie Boulton. Eldonis J. Régulo, La Laguna 1961. 159 p. Prezo: 7.— sv. kr.

Kontraŭe al la opinio de multaj estas mal-facile poeti en Esp. La vortfara karaktero ebligas ja unike fortajn esprimojn, ofte sen paralelo alilingve, sed ĝi ankaŭ danĝerojn pritenas: vortĝajemuloj liberas ŝtopi la neeviteblajn truojn siavse per senenhavaj silabaraj facilanimaĵoj. La socia rolo de Esp. estas ankoraŭ minimuma. Pro tio logiĝas tiel maloftege seriozaj kreantoj al verkado en Esp. Pro tio svarmas inter ni nuraj versemuloj, ne sendanĝeraj, ĉar ili konfuzas la ĝeneralan E-iston, malaltigas lian kriterion pri poezio kaj nia poezio — piedestaligita.

Despli bonvena estas tiu, kiu sukcese navigis sian boaton malgraŭ diversaj alfrapiĝoj kaj devojiĝoj.

Jam delonge mi konas de Kock, sekvas lian nehaltigeblan strebadon al kontentiga sintesprimo, konstatas la neeviteblan evoluon de lia poezio. La poemoj aperintaj en lia libro estas nur malgranda parto de lia verkaro. Mankas ekz-e la *Kvin elementoj*, longa kaj tre rimarkinda poemo, kies parto aperis en la Esp. Antologio. Kio konstante-ripete mirigas-admirigas min, estas la absoluta dediĉemo de la poeto al sia arto. Siatempo mi simple timis, ke despli drasta fariĝos la reago, kiam li unu tagon ekkonscios pri la fluktua bazo de artkreado en Esp. (Ĉi tiun krimon mi mem dolore spertis; oni kapablas verki tutan poemaron por unu homo — tiukaze ĉi tiu estas la bazo. Kiam li ne plu estas, kie starigu konstruo plia?). Sed Edwin

persistas — per si mem. Li estas potenca spirito, netimema, batalema, inteligenta.

Cu mi forgesas la libron mem? Ho ne, sed mi scias, ke Edwin pardonas al mi la disbabilon. Mi ankaŭ scias, ke li pardonos, se mi komence koncentrigos min al nur unu poemo lia: *Odo al la morto*.

Ĉi-poemo kelkmaniere estas aparta. Tamen, mi opinias, ke ĝuste ĝi elmontras ecojn pli kongruajn al la karaktero de la poeto ol la plej multaj aliaj. Mi klarigu kial. Ĉi tiun indignegegan ribelaĵon kontraŭ la Morto, li verkas post propra, konkreta travivaĵo, kiu ebligis al li ektravidi antaŭ pli-malpli akceptitajn falsajojn:

*"Per laboro, ĝuo, asketismo,
la Biblio aŭ psikologio —
la multegaj ismoj de la homo —
oni penas drogi la konscion,
por malvidi la kernan vivproblemon,
kaj la solan veran malamikon,
vin, ho rikanaĉa morto!"*

Li trarompas sian propran kirason kaj kvazaŭ rivelacie spertas sin mem, la nuran, nudan Homon sub la ŝelo. Kaj kiel estas atendeble ĉe de Kock, li verkas pri tiu unika sperto poemon, kiu majstre kombinas tremantan senton kaj turantan retorikon. Jen poemo al mi pli simpatia ol multaj kaj sendube unu el la kelkdek vere bonaj poemoj ĝis nun kreitaj en Esp.

La aliaj teknike montras la samajn trajtojn: inklinon al retorikaj esprimoj, originalan bildlingvon, kelkfoje ĝis eksceso, lok-loke ne-sufiĉan poluradon rilate la stilon kaj lingvan densigon. Ideoj kaj pensoj neniam mankas al li, kaj kiam li sukcesas esprimi ilin

reliefigas ĉiun pekon kontraŭ sia harmonio.

Oni ne akuzu min pri nekonsekveneco se mi nun devas tamen diri, ke Esperanto kelkrilate emas al iuj mallertaĵoj kaj sonefektoj kiujn la sentema orelo ne povas aprobi kaj devas nepre eviti pere de stila aranĝado. Mi ne diris, ke la poeto Zamenhof havis tute senmankan talenton

(kiu ja havas?) aŭ ke la lingvo, kiel ĝi venis el liaj manoj, estis jam *perfekta*. Tion opinii estus stultaĵo, nur samideana ŝovinismo. Samtempe mi ja volas aserti, ke Esperanto donas al la bona verkisto multajn eblojn por eviti tiujn mallertaĵojn, kiuj ordinare povas nur ekzisti ĉe senzorga lingvo-uzo, t. e., la babilado.

(Daurigota)

taŭforme — kaj tio estas ofta — li fariĝas granda. Tiel, ekz-c, en la poemo *Kristaligo*, vera juvelo:

*Akvo de la vivparolo
en la klara lumo bruas,
pro la ĝojo, tristo, folo;
kaj la viverego fluas
al la maro de silento.
Sed kaptite inter rokoj,
el la kuro de l'torento
kaj la plaŭdmortantaj vokoj,
vortoguto malleviĝas
korkavernen kiel semo —
kreske post la jaroj iĝas
stalaktito de l'poemo.*

Kaj jen la ambicio de Edwin de Kock: lia neŝanceblebla deziro verki longan eposon en la "granda stilo", kiu pritraktos la tutan ekzistadon el la vidpunkto de la religio adventista. Mi scias, ke li jam delonge pri tio revas, ĝi fariĝis por li "idée fixe". La poemego ankoraŭ ne estas finverkita, sed 9 el ties ĉapitroj estas aperigitaj en lia libro sur 42 paĝoj. Mi devas konfesi, ke komence mi havis fortajn dubojn kaj eĉ antaŭjuĝojn, ĉu tiaskala kaj tiatema poemo povos sukcesi. Sed baldaŭ mi fahis sub ĝia potenca sorĉo, vole-nevole. La temo multpunkte estas konata al la ĝenerala leganto: la ribelo de Lucifero kontraŭ Dio kaj la sekvaĵoj. Sed de Kock scias doni novan vivon al tiu mult-uzita mito. Tiucele li lerte utiligas metodojn de la moderna sciencifikio kombinitajn al tre energia lingvouzo, plena de drastaj bildoj kaj esprimoj. Tiel li sukcesas plenumi superban faron: teni la atenton de leganto, kiu ne simpatias lian religion. Turkre mi dezirus, ke la poeto daŭrigus la verkadon de sia riĉesprima poemego ĝis la fino. Eble ni iam ĝin vidos propralibere — kun taŭgaj ilustraĵoj.

Per ĉi tiu libro Edwin de Kock nekontesteble provas, ke li jam apartenas al la frontice de la malgranda taĉmento de seriozaj Esp. verkistoj. Lia pensforto, imagpovo kaj verkpreto superas tiujn de la plej multaj, sed lia tekniko estas igrade plibonigebla — mi menciuis precipe la dezirindecon de plia zorgemo pri utiligo de bildoj kaj metaforoj, plia vortŝparo kaj esprimdensigo. Liajn ideojn pri la prozodio fine de la libro mi trovas simple saĝaj kaj naturaj (ke la prozodio devas bazi ĝi sur la parola, ne surpapera lingvo). Mi tamen opinias, ke li ne faras tutan lojalecon al Kalocsay — ni konsideru ĉi ties valoregan studon pri la aplikoj de tempomezuraj versoj en Esp. *La klasika metro kaj Esperanto*, (necaj nroj 23-26 — miaopinie nepra studindaĵo por ĉiu Esp-a poeto.) *Bildur Ragnarson*

Ernst Olsson: Kredo-floroj-dinamito (Red. G. Henriksson. Eld. Societo Esp., Malmö. 80 paĝoj. Bind. sv. kr. 8:50. Broŝ. sv. kr. 4:75.

D-ro Ernst Olsson mortis juna. Li estis talenta sveda fizikisto kaj instruisto, esperantisto. En lia heredaĵo troviĝis ne tute finita, ampleksa manuskripto en Esp. pri svedaj pioniroj de kulturo, tekniko kaj scienco. El tiu manuskripto nun aperis 3 ĉapitroj, t. e. pri Sankta Birgitta, Linné kaj Nobel. Io, kio kunigas tiujn ĉi tri tute diversajn homojn en tempo kaj karaktero, estas la kombiniĝo de idealismo kaj praktikeco, kiuj ambaŭ estas karakterizaj je ĉiu el la tri personoj. La rakonto pri la unusola sveda katolika sanktuno el la mezepoko, estas viva kaj iluziveka. Sen ekstazaj strigimastikaĵoj ni interkonigas kun la eta, energia, organizkapabla vicineto, en ĉiu maniero praulino de la moderna laborvirina tipo; ŝiaj praktikaj atributoj kombiniĝis kun revelacioj. La lastajn ĉi akceptis nature, sen ekstaziĝo, tamen kun neskeuebla kredo. — Similaj trajtoj troviĝas ankaŭ en la karaktero de la genia Linné, sur kies vivverko fundamentiĝas grava parto de nia nuna naturscienco. La aŭtoritato de Linné antaŭ ni estas tiel memkompreneble giganta, ke oni apenaŭ pensas pri la bataloj (tute ne bagatelaj,) inter kiuj li kreis siajn verkojn. Linné devis venki kolosajn kontraŭstarojn kaj ŝviti por siaj rezultoj. Tio kio helpis lin, estis lia kredo pri si kaj pri la tasko, kiun la Providencio donis al li. — Alfred Nobel inventis la dinamiton kaj aliajn rimedojn, intense uzatajn i. a. en la militoj. El la trio li estas la plej enigma paradokso: riĉegulo, akuelirno de la milita tekniko, sed humanisto kaj pacisto, kiu neniam forĝis, ke li mem neniam vizitis lernejojn. Li lernis eĉ la teknikon nur praktike sen altlernejaj aŭ universitataj studoj kaj ankaŭ liaj elementaj lernejoj studoj malhavis la kontinuecon.

Ĉiuj tri ĉapitroj prezentas la saman simple konvinkan manieron; tiu pri Linné eble estas iom tro abunda en detaloj, kiuj ne ĉiam signifas multe al la nuna laika leganto. Entute la verko atingas tamen senerrare sian celon kaj estas rekomendinda al ĉiuj.

La redaktadon oni povas laŭdi: la sola afero, kion oni povus kritiki, estas la manko de konsekveneco ĉe la transskribo de nomoj kaj loknomoj; anstataŭ la paralela uzado de diversaj principoj oni preskaŭ preferus la originalan ortografion — unuece — kun unusola noto pri la ĝusta aŭ proksimuma elparolo.

ATISMO – ITISMO?

H. A. de Hoog, D. B. Gregor, K. Kalocsay, S. La Colla, I. Lapenna, T. Nakamura ("Teruo Mikami"), T. Pumpr, J. Régulo, R. Schwartz, E. Sonnenfeld, G. Waringhien: La Zamenhofa Esperanto. Simpozio pri-ATA-ITA. — Kovrilo de John Hartley. — Stafeto: Movado, 2.— J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1961.—22,5x15 cm.—338 (VIII | 330) paĝoj. — Prezo: 3 usonaj dolaroj.

En la enkonduko de la digne grava volumo (kun atomfortaj nomoj) J. Régulo konstatas, ke la diverĝa uzo de la participoj en nia lingva mondo jam delonge ekzistis, sed la afero atingis por la lingvo sian danĝeran kulminon, kiam en Bruselo (1960), i. a. la prezidanto de la akademio disdonis cirkuleton kun la ekvacioj (ekskluzivaj) — *inta* — kiu is, ita kiu (kion) oni -is. — Laŭ la zamenhofa lingvouzo -is-inta -ita havas du eblajn funkciojn, unue imperfektivajn (senkonsidere ian rezulton) aŭ perfektivajn kun plena konsidero de la rezultatingo. Tute mallonge menciante la alian oponenton T. Jung, laŭ li la -i-participoj esprimas antaŭtempcon de ago aŭ farigo. — La originalan opozician prof. Collinson ni ne citas, ĉar sin li mem reviziis kaj kvankam tute ekster la itista tendaro, li ŝajnas esti nuance pli proksima al la aspektistoj ol al la rigida tempista teorio. La oponentoj en iu aŭ alia maniero malkonfesas la zamenhofan uzadon (ververe sub la etiketo "zamenhofaj malfortaj aŭ zamenhofaj eraroj").

Nu, pri tio ne estas dubo, ke Zamenhof uzis *konscie* siajn participojn kaj li konsideris E-on kiel ekvivalentan interan lingvon. Kiel li ne akceptis la senartikolan sistemon kiel nefavoran, same konscience li tenis sin al la principo, ke la plenumiĝo de la ago estas stato de "iteco". Kontraste la neplenumiĝo, t. e. daŭro, indikas la formon *esti ata*. Ke tio ne konformas al ĉiuj lingvoj kaj sekve povas signifi implikecon jen kaj jen, tio estas fakto — unu el la faktoj.

Pri la logika, simetria, tempa sistemo de same meritplenaj nomoj tamen baldaŭ klariĝas, ke ĝi ne estas senkomplika, male: ŝarĝita de rezervaĵoj, efektive ĝi neniel superas logike la aspektan teorion; unurilate ĝi estas danĝera, ĉar el la zamenhofa konstruaĵo ĝi penas eloperacii fundamentan ŝtonon: ŝtonon, kies loko estas nek hazarda nek erara. Lapenna donas frapan ekzemplon pri la logikaj transkapiĝoj sub la etiketo "pliboniĝo": "Ĉu HEROLDO ne skribis: Se la helpa

verbo estas en la ordona modo, la pasiva participo uzota devos esti la estanta participo kaj neniu alia. Ĉu tio ne signifas, ke... oni devus diri: La estraro de UEA decidis, ke la kongresejo estu malfermata de... ĝis... horoj. (Kio signifus, ke la estraro dum la tuta indikita tempo okupus sin pene pri la malfarmado de la kongresejaj pordoj.) En la simpozio de la Stafeto ĉiu estas vera eminentulo kaj ĉiu estas laŭ sia propra maniero elokventa kaj konvinka; mem la kolektiĝo de tia elito devas atentigi nin, ke temas pri grava afero, pri kiu oni povas legi klasikaĵojn de Kalocsay, logike sisteman altbligon de de Hoog; temperamentan, vivoplenan kontribuon de Lapenna kaj R. Schwartz, tre interesan studon de Teruo Mikami, kies finvortoj kun la subtitolo "Kio estas aspekto?" apartenas al la plej brilaj paĝoj de la potencia verko. Same oni povas nur admiri la koncizajn notojn de La Colla, la simpatian kaj sciencan emfazon de J. Régulo; fine de la libro oni trovas mallongajn klarigojn de prof. Waringhien, kiuj senescepte trafas la centron de la problemcirklo. En la apendico oni trovas kontribuojn de D. B. Gregor (la klasika tradukinto de la Sofoklaj tragedioj), kies konkludo estas: "Estas klare, ke la zamenhofa uzado de *ata* konsistigas logikan, koheran sistemon, jam delonge enirintan en la strukturon de la lingvo kaj tial la pensmanieron de ĝiaj adeptoj. Tuŝi tion signifus ŝanĝi la lingvon." En la "Apendico" aperis ankaŭ debata letero de Ernesto Sonnenfeld, germanlingvulo el Ĉeĥoslovakio, kiu jam de 1938 loĝas en Argentino. Nu, vi trovas entute kontribuojn de Anglujo ĝis Japanujo.

Intence ni mencias kiel lastan la monografion, fundan kaj profundan, fundamentan de d-ro Pumpr, Lia pli ol centpaĝa monografio "Esperanto sen aspektoj" estas la plej ampleksa, plej elĉerpa pritrakto de la temo. La monografio prezentas la verkinton, kiel sagacan, emfazan, sed ĉiam prudente trankvilan debatiston, kiu trans la teorio vidas klare la situacion kaj venas al iu konkludo, kiu esence povas esti ankaŭ nia opinio, t. e. serĉi konsenton inter la du elitgrupaj opinioj. Pri nova diskut-aldono aŭ detala recenzo ni ne povas pensi, parte principaj, parte spacaj pripensoj barus nin pri tio, sed ni devas akcenti, same kiel Pumpr, ke la disduiĝo en si mem estas patologia fenomeno. Unu el la tendencoj sekvas la Fundamenton, ĝi do donas pli grandan sekurecon. La alia penas — laŭ ni ne-sukcese — pri simpligo. Ni ne

povas permesi al ni la lukson lasi ne ŝtopitan breĉon sur nia ŝipflanko. — Aliflanke akriĝo de tiu ĉi batalo efikas katastrofe en nia organismo. D-ro Pumph proponas kompromison, iaspecan armitricon kaj toleremon, bazon por solidiĝo.

Subskribinto trovas plej konsiderinda kaj rekomendinda la unuan parton de tiu ĉi "treuga Dei", t. e., ke oni uzu laŭeble aktivajn formojn anstataŭ la pasivaj frazoj. El ekzemploj oni povas lerni. Mia gepatra lingvo, la hungara evoluis dum la lastaj jarcentoj tiel, ke la kunmetitaj verbtempoj simple malaperis kaj kiel en Esp. ankaŭ en la hungara lingvo oni povas perfekte vivi sen la apartaj formoj de imperfekto, perfekto, pluskvamperfekto. Sekve en Esp. hungaroj volontas uzas la zamenhofan formulon de la tri simplaj verbtempoj. Por okcidentano tio efikas eble nekomplete, kurioze, sed en ĝeneralaj okazoj la cerbo de la akceptanto rapide kaj subkonscie aldonas sian kompletigon, se la alparolanto mem ne aldonis la savan vorteton "jam" aŭ similan. La hungara lingvo, kiu ja kune kun la finna, estona k. c. estas ekster la ĉefaj eŭropaj lingvogrupoj, jam antaŭ longa tempo konscie ekzilas la pasivan fraz-konstruon: "Ita-ata-ota — oni diras — en la hungara ne estas uzata." Nun tio, kio rilatas Esp-on, la fakto, ke nia helpverbo estas disilaba (estas), al kiu aldoniĝas la pasiva participo, grave plilongigas la lingvon. Ĉu ne estas pli bele kaj pli simple doni konkretan aktivan karakteron (kun ebleco de pasiva formo, se nepre necese) al la lingvo kaj diri: "Oni konstruis la domon en 1925." anst. "La domo estis konstruata/ita en 1925." Estas klare, ke la *kompreno* de la aktivaj frazoj aperigus la saman diferencon en la du grupoj, almenaŭ provizore, sed ni ne persekutu la pensojn, maksimume nen esploru ilin kaj ĝustigu, se necese. Kun plura pravigo de la aspekta teorio, sed kun estimo de la kontraŭa intenco kaj tendenco, mi konsideras la supre menciitan vojon kiel taŭgan travadejon, aŭ kun uzo de alia metaforo, kiel laŭcelan fulmforigilon (kiu ne neniigas la fulmon, sed ĝian malutilan efikon).

La monumenta verko pri la "Zamenhofa Esperanto" por ĉiuj, kiujn interesas la esenco kaj kerno de nia lingvo, sendepende ĉu oni estas atisto aŭ itisto, estas nepre legenda (varia, interesa, multloke eĉ amuza) verko. Sed ĝi nepre nefavore efikas ĉe tiuj, kiuj ankoraŭ ne trapasis la novicajn dubojn. Ĝi estas grava lingvistika verko; tendence ĝi ne servos por akriĝi la batalon, sed por trovi la komunan nominatoron, t. e. la Fundamenton.

F. S.

Kolorplena novelaro

Bulgara Prozo: (19 noveloj, 252 p. Tolbindo. Eld. de Fremdlingva literaturo, Sofio).

La bonredaktita, bunta novelaro menciigas per klasikaj nomoj: La unua aŭtoro estas *Ivan Vazov*, kies novelo "Ĉu li venas?" estas melankolia rakonto pri vana atendo post milito je familiano, dume lian tombon la neĝo surŝutas ie en okcidenta Bulgarujo. La sekva novelo, tiu de G. P. *Stamatov* karakterizas karieron de fripono kaj la tenton, kiun tio vekas en honestulo. Same, aŭ eble eĉ pli kolorriĉa ol la unuaj estas la novelo "Sura Bir" (*A. Ŝtraŝimirov*); produkto de malfrua romantismo kun aldonado de realismaj trajtoj. Entute: unu el la plej efektplenaĵoj verkoj en la libro. La "Falcistoj de *Elin-Pelin* estas alloge simpla, popoleca rakonto pri turmento de juna animo, kiu batalas inter la laborrudo kaj la amo, kiu lasta fine venkas la unuan. "La blanka hirundo" de *J. Jovkov* estas verketo pri popolkrede servanta por esti kvazaŭ pajlero al drononto. *L. Stojanov* prezentas sin per la bonege verkita (al la scito de Verga rememoriginta) bela novelo "Hatiĝe"; Tragedio ĉirkaŭ la kaptigo de dizertulo. Tiuj ĉi ses noveloj reprezentas la estintan, la sekvaj la nunan literaturon. Laŭ la karaktero de la vivo, la elekto el la jam kristaligitaj valoroj estas pli facila kaj pli efika, iliaj temoj estas ofte ĝeneralaj, ili efikas ĉie kaj al ĉiu. Al tiu kategorio apartenas ankaŭ la satira novelo, iom pli malfrua (el 1934) de *Minkov*: Tio okazis en Lampa-deforio". La nunaj noveloj okupas sin pri la kooperismo (*I. Volen, St. C. Daskalov C.*) pri la diferencoj inter la pasinteco kaj la nuno, pri la komuna batalo kontraŭ la analfabeteco, pri negativaj kaj pozitivaj karakteroj en la nova socio (bona novelo de *Grubeshleva*), pri la ĵuspasinto: partizanaĵo bataloj (*Vejinov, Manov* — kortuŝa novelo: "Migdalarba branĉeto"), Ankaŭ tiu ĉi parto estas homogene nivela: se oni volus tamen elekti, oni nomus plej volonte krom la menciitajn "La vizito"-n de *Grigorov*, kiu havas ian sentempan en si: la kontraston de la maljunula kaj la nuntempa pensadoj kaj la ebolon por repaĉiĝo kaj la komike satiran, eterne aktualan "La kazo Penlevé" de *Neznamkov*. Ankaŭ "La agloj" de *E. Stanev* estas valora bela novelo, analizo de la solidaraĵ sentoj en la vivo de birdoj. La tradukoj estas bonaj: plej multe da noveloj tradukis *S. M. Simeonov*, sed sendube ankaŭ ĉiuj aliaj faris tre bonan laboron. Mankas enkonduko kaj biografiaj notoj pri la aŭtoroj.

Interesa, leginda kolekto.

F. S.

Medicinista scienco el la Oriento

Lernolibro de oftalmologio, de Seiĉi Kato, Prof., D-ro, Direktoro de la Klinikoj de Shinshu Universitato; 18x26 cm., 88 p., tole bindita; eld. de Eldoni Aŝima, Tiba, 1959.

Nia korpo, de Seiho Nishi, D-ro, emerita profesoro de Tokio Universitato, eksrektoro de Gunma Universitato; 15x21 cm., 106 p., broŝ.; eld. de Gunma Esperanto-Societo, Maebaŝi, 1961; prezo 6: 25 sv. kr. (Eksportata ekskluzive de Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati 1, Tokiaj).

Facila lernolibro de anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj kun 34 figuroj.

Dum la Zamenhofa centenario pretiĝis la unua oftalmologia lernolibro en Esp.; simbola omaĝo ĝi estas al la aŭtoro de nia lingvo, kiu mem estis okulkuracisto. Studentoj de medicino, kuracistoj aŭ tiuj, kies studoj iel rilatas la optikon, nepre kun grava utilo povas studi la bele fabrikitan libron, kiu merode okupas sin pri ĉiu temo de la okulkurado. Faka maniero, fakaj ilustraĵoj kun taŭgaj indikoj formas konfidindan gvidlibron al fakula publiko. Nefakuloj? Ankaŭ ili povas interesiĝi pri la libro, kondiĉe se oni emas kontraŭstari la tenton konstati ĉiujn okulmalsanojn ĉe sia propra vidorgano.

Le libro konsistas el 26 lekcionoj. La unua parto konsistas el 12 ĉapitroj pri ĝeneralaj temoj, t. e. vidorgano, vidkapablo, vidkampo, kolorsenso, pupilreakcio, funkcio de okulmuskoloj ktp.; la speciala parto okupas sin pri detalaj malsanoj, t. e. pri tiuj de la palpebro, larmaparato, konjunktiva membrano, korneo, retino, optika nervo, lenso ktp. ktp. — Tiu ĉi parto — malgraŭ la konciza formo — donas amason da instruoj, resp. indikoj pri terapio, aŭ plua studado. La ĵus menciita parto ampleksas 64 paĝojn, la ĝenerala 24.

El la supra prezento oni povas rajte konkludi, ke la libro apartenas al la pozitivaj gajnoj de nia libraro kaj ĝi estos populara en fakrondoj kaj ankaŭ ĉe parto de laikuloj Ĝiaj eksteraj, papero, fortika tolbindo toleras oftan foliumadon. La sola ne tute kuracita malsano en la libro estas la "preseraritaro".

La dua medicina libro estas "Nia korpo", t. e. anatomio kaj fiziologio por laikoj. La meritplena aŭtoro, same kiel tiu de la ĵusmenciita verko, sukcese alvokas la atenton al sia temo, tiaokaze pri la homa maŝinaro, kies strukturon, taskojn kaj funkciojn li konigas en laŭeble plej populara lingvo. La intenco estas estiminda kaj alte taksinda: la moderna evoluo gvidas la unuopulon pli kaj

pli proksimen al la faka scio, precipe kiam temas pri la propra korpo kaj sano, kaj tiaj libroj povas esti pionirverkoj de tiuj tempoj, kiam en ĉiu familio, kaj en ĉiuj rondoj troviĝos kompetentuloj, kiuj servos kiel perantoj al la tute fakaj kuracistaj kaj flegistaj institucioj. La verko de prof. Nishi estas taŭga libro por similaj celoj, ĝia efiko estas nepre grava: ĝi estas faklibro, uzebla tamen ankaŭ de nefakuloj.

La ĉefaj ĉapitroj de la bone presita libro okupas sin detale pri la strukturo kaj la substancoj, organoj de la homo, iliaj funkcioj kaj taskoj. Ambaŭ partoj la anatomia kaj la fiziologia estas formitaj tre kontentige kaj oni sentas plezuron pro la fakto, ke nia centre grava lingvo havas tian centran lernilon por la tuta terglobo. La fakterminoj, kiuj neeviteble aperas en la libro, havas siajn klarigojn, sekve oni apenaŭ bezonas antaŭajn studojn por kompreni la verkon.

Oni nur esperas, ke similaj libroj kun ŝanco de granda populareco aperos ofte en Esp. — Kompreneble por tio oni bezonas pruvon pri la disvastiĝo de la unuaj tiaj verkoj.

F. S.

Spegulo de Islando

Olafur Hansson: Faktoj pri Islando, trad. Baldvin B. Skaffell. Eld. Eldona Sekcio de la Kultura Fondaĵo, 1961. Reykjavik 72 p. Prezo ne signita.

Bonega libreto pri la altkultura norda lando — kun bonaj ilustraĵoj, vera gajno de nia tiaspeca fakliteraturo. La libro konsistas el la jenaj partoj: La lando, La loĝantaro. Urboj, Historiaj datoj, Registaro kaj Administracio, Eksterlandaj aferoj, Religioj kaj eklezio, Edukado kaj instruado, Socialaj aferoj, Sporto, Interkomunikado, Vojaĝado, Kelkaj lokoj de intereso, Laboro kaj industrio, Kulturo, Kelkaj konataj islandanoj, Kiu estas kiu en Islando hodiaŭ, Islanda nacia himno.

Ĉar la lando estas multrilate diferenca de aliaj landoj, (ĉiuokaze kun tre alta kaj praa kulturo), la libreto estas plene interesa ne nur al tiuj, kiujn praktikaj turismaj detaloj interesas, sed al ĉiu legemulo. Bona traduko de la konciza klara originalo.

Distingo por E. Privat

Pacasocio de Stockholm distingis E. Privat per premio 1961 el la rentoj de la J. Larssona heredaĵo, kiel rekonon de la granda porpacca laboro de prof. Privat.

Belarto 1961

Post iom da paŭzo denove aperis la belarta "jarlibro" de UEA, kies redaktora nomo, William Auld, garantias jam en si mem riĉon, valoron kaj pretendojn. La 68-paĝa albumforma kajero enhavas tiom de sukaj ingrediencoj de literaturo, arto, kulturo kaj eĉ debato, ke oni povas nur rekomendi la tutan eldonadon sen detaligo de la bona juĝo: sufiĉas eble diri, ke pli ol 30 konataj kunlaborantoj kunmetis tiun ĉi buntan mozaikbildon de diversnacia kaj internacia kulturo. La tradukverkoj, same, kiel la originalaj aŭtorismoj ampleksas la tutan teron, de la brita regno ĝis la japana literaturo, kaj de W. Auld ĝis Henri Vatré, kiu laŭ la alfabeto estas la lasta nomo inter la kunlaborintoj.

La diskuto pri la "Esperanta Antologio" (recenzita de A. D. F.) en londona semajna gazeto, eĉ en tiu ĉi sumeca prezento meritas apartan mencion. Laŭ la recenzinto — mem E-isto kaj reprezentita en la Antologio — "la fatala sorĉo de esperanta verkado estas tio, ke, kvankam la homaro bezonas unu lingvon, oni ne povas verki por la homaro, simple uzante neŭtralan perilon." Ni kredas, ke tiu ĉi frazo estas esenca en la, iom kurioza recenzo, je kiu respondis W. Auld, Juan Régulo Pérez grave kaj prave, dum la tria alparolinto Clelia Catterno movad-opozicie bruligas siajn amuzajn paradoksojn, ne ĉiam sen pravo.

F. S.

Lanti

Lanti pri Sennaciismo (Eld. SAT. 16 p.) La kajero estas represo de kelkaj paĝoj el la "VORTOJ", kiujn oni povas relegi kun sento de ĵusdiritaj, aktualaj kaj interesaj, depende de la viva stilo kaj pripensiga enhavo de tiuj ĉi diraĵoj.

Teodoro Kovács mortis

Originala, simpatia malnova pioniro de la tutmonda movado, Teodoro Kovács mortis la 24-an de okt. en sia 82-a jaro. Senlaca, vigla, bonvola kaj vastinteresa viro li estis en siaj sanaj jaroj; de la cigana lingvo ĝis la ampleksa kolektado de ĉiuj E-ajoj ĉio interesis lin. Li ne povis atingi la ĉiĵaran 60-jaran jubileon de sia esp-isteco, je kiu li preparis sin i. a. per la E-instruado de la flegistinoj en la hospitalo, kie li kuŝis dum longa tempo.

Nia koro gardos la memoron de ĉi infane puranima, bona fervorulo.

F. S.

La 47-a UK (en Kopenhago 4—11/8, 1962)

kies alta protektanto estas la ĉefministro dana Viggo Kampmann, kolektas en sian honoran komitaton la plej altan eliton de la dana socia vivo. El tiu listo ni citas nur la jenajn nomojn: Gustav Pedersen, prezidanto de la dana parlamento, K. Helveg Petersen, ministro de kulturo, J. O. Krag, eksterpolitika ministro, d-ro prof. Niels Bohr, fizika Nobelpremiito. Se spacomanko ne barus nin, plezure ni donus la tutan liston.

Dum la kongreso okazos la Unua Internacia Konferenco Esperanta de Sciencistoj.

La 35a SAT-Kongreso en Vieno

okazos 4—10 aug. 1962. Ĉefurbestro Franz Jonas, malnova kaj eminente perfekta Esperantisto akceptis la honorprezidantecon de la kongreso. Okazos akcepto de la kongresanoj en la urba domo de la malnova, bela metropolo kaj senpaga rondveturo per urbaj aŭtobusoj. Pri eventualaj hoteloj, tendumado, partopreno kiel gasto ktp. petu informon de SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20.

Por filatelistoj, esp. kolektantoj!

La svisa poŝtadministracio en kunlaboro kun la Svisa Esp.-Societo uzos en la jubilea jaro 1962 specialan stampilon por senvalorigi la poŝtmarkojn. La stampilo enhavas portreton de Zamenhof kaj jenan tekston: "75 Jahre internationale sprache".

Interesuloj, kiuj ne havas svisajn korespondantojn, povas sendi al la suba adreso adresitan respondkoverton kaj 2 int. rk.

La subskribinto ne povos korespondi pri tiu-ĉi servo. Adreso: J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 57, Svislando, centra kaskisto de la Svisa Esp.-Societo.

Enigma konkurso

La solvon (Forge, Privat, Auld, Francis) el la 4:1961-a n-ro multaj ensendis. La bonŝanco favoris s-inon Bl. Iserewrant — Schepews, Blankensteenweg 72, Brugge (Belg.), al kiu ni forsendis premiilibron.

La unua tasko ne estas sekreta skribo, oni devas nur... legi:

Nu92vi22m2bb.

Inter la solvintoj ni lotas libropremion. Lintempo: 1/4, 1962.

UTGIVAREKORSBAND

Norda Prismo

Barnhusgatan 8. Stockholm

Bilaga medföljer

KREDO, FLOROJ KAJ DINAMITO

de Ernst Olsson.
Redaktis Gösta Henriksson

Tri biografiaj rakontoj pri Birgitta, sanktulino en la Nordo, pri Linnaeus, la reĝo de la floroj, fondinto de la moderna botanika scienco, kaj pri Nobel, la industriulo kaj inventinto de la dinamito, kiu tamen ankaŭ iniciatis la nobelpremiojn. La libro estas originale verkita en esperanto de la juna sveda fizikisto kaj instruisto d-ro Ernst Olsson. 80 paĝoj. Broŝs. 4.75 sv. k. Bind 8.50 sv. k.

Aperis ĉe
Eldona Societo Esperanto
Fack 7C43 Malmö 7

FROSTAVALEN

12—19 aŭg. 1962.

Post la Universala Kongreso en Kopenhago.

TEMO:

UNESKO — SEMAJNO

- La Laboro de UNESKO — La Granda Projekto Oriento-Okcidento —
- Cefverkoj de la Monda Literaturo en la Internacia Lingvo —

Informojn kaj aliĝilojn vi povas peti ĉe s-ro Jan Strönné, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo.

La homaro kaj la mondbildo

libro de MARTINUS

kontaktigas vin kun bazaj analizoj pri la homo kaj pri mikro- kaj makrokosmo.

Per tiu libro Martinus prezentas eksterordinare interesan verkon, kiu parolas al via racio. Prezo 6:50 d. kr., 13 UL-steloj aŭ 0:95 usonaj dolaroj.

La Spiritscienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F. Danujo.

Mendu librojn

ĉe Esperanto-Skolan Barnhusgatan 8, Stockholm.



MALNOVAJ JARFOLIOJ DE NORDA PRISMO

Taŭga donaco al orienta amiko 1958-1961 por 7.— sv. k. po unu jarfolio. (1.50 Us. Dol., 18 int. resp. kup.)

S-ro Wang Chonfang,

Secondary School 18. Harbin, China dez. koresp. tutm. pri liter., precipe poezio, en Esp., angle, hungare.

KOMPLETA LITERATURA MONDO (3-a periodo)

kaj unuopaj LM-numeroj troviĝas ĉe L. Somlai, Bajcsy-Zsilinszki ut 40. Budapest, Hungarl.

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

Membrokotizo nur 10 steloj jare.

Informoj ĉe

Prof. B. Popović, Zagrebačka 24.
Sarajevo (Jugosl.)

"I. F. S. en Romans"


La grupo "Bona Stelo" 31, rue Pêcherie Romans Drôme FRANCUJO organizos de la 20-a ĝis la 27-a de Julio 1962 Internacian Ferio-Semajnon laŭ plej favoraj prezondiĉoj, en tutamikeca atmosfero. Mirinde bela regiono. Petu rapide informojn. Limigita kvanto da aliĝoj.













Oskar Just: Islanda pejzažo










Portreto de Oskar Just



O. Just: Ásgeyr Ásgeyrsson, islanda štatestro